


EL POPOLA ĈINIO

Laboristo trejnita
en Sovetio klarigas
pri manipulado de
Soveti-farita tornilo
en la ĵus finkons-
truita Senjunt-tuba
Fabriko en Anŝan

Dec.
1953



Kreskanta Intereso en Komercio kun Ĉinio

Ĝi Ĉau-ding

La eksterland-komerca politiko de la Ĉina Popola Respubliko neniam ŝanĝiĝis de la komenco. La Komunista Programo, nia fundamenta leĝo, diras tre klare:

La Ĉina Popola Respubliko povas restarigi kaj disvolvi komercajn rilatojn kun eksterlandaj registaroj kaj popoloj sur bazo de egaleco kaj reciproka profitigo.

La efektiva plenumo de ĉi tiuj principoj dum la pasintaj kvar jaroj pruvis ke ili donas profiton ne nur al la ĉina popolo sed ankaŭ al tiuj kiuj volas komerci kun Ĉinio sur la nova bazo.

La fundamenta ideo en nia politiko estas paca kunekzistado de ĉiuj landoj, sen konsidero de la diferencoj en iliaj ekonomiaj kaj politikaj sistemoj. Ĉi celas la ekspansion de internacia komercio en la intereso de paca internacia kunlaboro.

Inter 1949 kaj 1951, komercio inter Ĉinio kaj la Okcidentaj landoj, precipe Granda Britio, ne nur restarigis rapide el la detruoj de la Dua Mondmilito sed ankaŭ disvolviĝis sub la favoraj kondiĉoj kreitaj de la eksterland-komerca politiko de nova Ĉinio. Tamen depost 1951 ĉi tiu tendenco estis malhelpata de homfarita bariero—la embargo kaj atencita blokado diktataj de la Usona registaro. Tiuj Okcidentaj landoj kiuj subiĝis al Usonaj politikoj nur malpligrandigis siajn proprajn merkatojn, tiel kompromitante la ekonomiajn interesojn de siaj popoloj.

Historiaj Ŝanĝoj

La embargo kaj blokado ne kreis malfacilojn por Ĉinio en ekonomio, kvankam tio estas ilia definitiva intenco. Kontraŭe, ĉina komercio kun eksterlandoj ĉiam pli kreskis.

La ekspansion kaŭzis la historia ŝanĝo en la direkto de ĉina eksterlanda komercio—al Sovetunio kaj la Popolaj Demokratioj. En 1950, komercio kun ĉi tiuj landoj konsistigis nur 26 procentojn de la tuta eksterlanda komercio de Ĉinio. En 1951, ĝi pliiĝis ĝis 61 procentoj kaj en 1952 ĝis 72 procentoj. En 1953, la proporcio probable ankoraŭ plialtiĝos.

Ĉina eksterland-komerca bilanco fariĝis favora en 1951 por la unua fojo dum 73 jaroj kaj la volumeno de komercio konstante kreskas.

Same signifoplena estas la epokfara ŝanĝo de la karaktero de nia komercio. Estante fidelaj al la spirito de amikeca kunlaboro inter la landoj en la pactendaro, Sovetunio kaj la Popolaj Demokratioj provis nin per grandkvanto da ekipaĵoj kaj materialoj bezonataj en nia programo de industria konstruado. Antaŭ liberigo granda proporcio de importaĵoj konsistis el luksaĵoj kaj nenecesaĵoj dumpingitaj de Okcidentaj komercistoj.

Anstataŭ esti elĉerpilo de niaj riĉfontoj, kiel dum antaŭliberigaj tagoj, ĉina komercio kun eksterlandoj fariĝis grava faktoro ne nur en industria disvolviĝo sed ankaŭ en la altigado de la vivnivelo de la popolo. La tuta ekonomio de nia lando estas en proceso de ekspan-

siĝado kaj ŝanĝado. Same statas nia komercio kun eksterlandoj, kiu kreskas kun rapideco. Ĉiuj landoj kiuj havas normalajn komercajn rilatojn kun ni prenas sian parton en la profitoj.

Hindio kaj Cejlono Profitas

En kontrasto kun multaj Okcidentaj landoj kiuj subiĝis al Usona premado kaj partoprenis en la kontraŭleĝa embargo, sekve senigante sin de profitoj el komercado kun Ĉinio, aliaj landoj, kiel Hindio kaj Cejlono, kontraktis komercajn kontraktojn kun Ĉinio sur la bazo de egaleco kaj reciproka profitigo. En 1951, kiam Hindio urĝe bezonis nutraĵojn, Ĉinio provizis ĝin per pli ol 66,000 tunoj da rizo kaj 450,000 tunoj da sorgo. En oktobro de 1952, Ĉinio kontraktis komercan kontrakton kun Cejlono. Ĉi tiu estis plenumita en la sama jaro per kvinjara kontrakto pri la interŝanĝo de rizo por kaŭĉuko subskribita en Pekino de la reprezentantoj de ambaŭ flankoj. Kiel S-ro R. G. Senanayeke, Cejlona Ministro de komercio kiu intertraktis la ĝeneralan kontrakton, diris:

"Cejlono akiris du gravajn profitojn el la kontrakto kun Ĉinio. Ĝi helpis stabiligi la Cejlonan kaŭĉukan industrion en kriza tempo kiam malalta prezo estis ĵetanta grandan nombron da homoj en senlaborecon kaj ĝi kvietigis la maltrankvilon pri la nutraĵo-situacio."

La Usona aŭtoritato, kompreneble, klopodis ĉiel bloki la komercadon inter Ĉinio kaj Cejlono. Ne malpli oficiala persono ol Averill Harriman, la tiama estro de la Usona Ekonomia-kunlabora Administracio, senhonte kaj publike atakis ĝin. Sed la okuloj de la Cejlona popolo estas klarvidaj, ne blindigeblaj per polvo kiun Harriman provis enĵeti en ilin. Kiel S-ro Senanayeke komentis sufiĉe milde, "La Cejlona publiko inklinita al la opinio, ke la kulpo de la lasttempa Usona politiko, certe laŭ tio kio koncernis Cejlonon, kuŝas en tio ke ĝi donas tro malmulte kaj postulas tro multe."

Multaj Komercaj Kontraktoj

Malgraŭ la malhelpoj faritaj de Usono, individuaj komercistoj kaj privataj komercaj organizoj en multaj Okcidentaj landoj klopodis fervore por komerci kun Ĉinio. Dum la Moskva Ekonomia Konferenco en aprilo, 1952, komercaj kontraktoj estis subskribitaj de la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio kun komercistoj el 11 landoj.

Depost la Ekonomia Konferenco, multaj pluaĵaj kontraktoj estis subskribitaj. Inter la elstaraj ekzemploj estas la ĉina-japana komerca kontrakto subskribita en junio, 1952 kaj dufoje renovigita, en januaro kaj junio, 1953. En la dua parto de 1952, la Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio efektivigis komercajn kontraktojn kun Okcident-germaniaj kaj ĉilaj komercistoj. Ĉina-Franca Komercia Kontrakto pri ambaŭflanka liverado de komercaĵoj valorantaj 10 milion sterlingfuntojn estis subskribita inter Franca Komercia Misio kaj la

Ĉina Ŝtata Importa kaj Eksporta Korporacio en junio, 1953. En la 5-a de junio, 1953, la Ĉina Ministerio de Eksterlanda Komerco subskribis komerc-kaj pag-kontrakton por la jaro 1953 kun la Komerca Miso de la Registaro de Finnlando. Ĉina-Brita Komerca Kontrakto pri liverado de komercaĵoj kostantaj 15 milion sterling-funtojn de ĉiu flanko estis subskribita de grupo da britaj komercistoj kaj la sama korporacio en julio, 1953.

Sub ĉi tiuj aranĝoj multaj gravaj fabrikoj kaj komercaj firmoj en la landoj koncernaj intertraktis kontraktojn kun la komercaj agentejoj de la ĉina registaro. Spite al la daŭro de homfaritaj limigoj, konsiderinda fluo da komerco inter Ĉinio kaj la Okcidento rezultigis.

Protesto kontraŭ Limigoj

Kontraste al la malnova Ĉinio, la nova Ĉinio ne dependas de komercado kun la Okcidento. Tamen, kiel faktoj pruvis en la pasintaj kvar jaroj, ni ĉiam volas havi komercajn rilatojn kun la Okcidento, aŭ kun iu alia parto de la mondo, sur la bazo de egaleco kaj reciproka profitigo. Sed komercado estas duflanka afero. Ĝi ne povas rapide disvolviĝi dum la Usonaj limigoj, kiuj kontraŭas la interesojn de ĉiuj landoj koncernaj, ne estas forĵetitaj.

Konscio pri ĉi tiu fakto ĉiam kreskis, precipe ekde la armistiko en Koreio. Kiel iu ajn kiu esploras la mondan gazetaron, povas vidi, la postulo por Orient-Okcidenta komercado komencis leviĝi antaŭ ol la inko sekigis sur la armistika kontrakto.

En Britio kaj Francio

En Britio, Clement Attlee, gvidanto de la Laborpartio avertis en la Ĉambro de Deputitoj en la 30-a de julio ke "ekonomia blokado estas duklinga armilo." Frue en aŭgusto Harold Wilson, eksprezidanto de la Komitato de Komerco, publikis artikolon en la *Reynolds News*, postulante tujan ĉesigon de la embargo kaj dirante ke la malfermo de la ĉina merkato servos kiel toniko al la Okcidento.

Komercistoj en intima kontakto kun la situacio estis eĉ pli malkaŝema. La industria korespondanto de la *Birmingham Gazette* skribis la 6-an de julio ke oni kredis ke "kelkaj Usonaj firmoj, malgraŭ la kompleta limigo fare de sia lando al komercado kun Ĉinio, jam estas intertraktantaj por penetri en la merkaton." Li ankaŭ raportis pri la mistika rimarko de iu ĉefa industriisto de Midlando, kiu diris, "Se ni ne ekspluatas la merkaton kiel eble plej frue, aliulo tion faros kaj ni restos ekster la pordo en la malvarmeco... Ni devas esti realistaj... ni ne povas neglekti grandan eventualan merkaton kiam eksportoj estas tiel urĝe bezonataj."

De la britaj laboristoj venis ankoraŭ pli forta postulo por komercado kun Ĉinio. La kuna kunveno ĉiujara de la Ŝipkonstruista Unuiĝo kaj la Maŝinlaboristaj Asociaj Unuiĝoj, reprezentanta entute tri milion laboristojn, akceptis rezolucion kiu enhavis la sekvantan aserton:

La konfederacio kredas speciale ke la limigo de komercado kun Orienta Eŭropo kaj Ĉinio perforte altrudita de Usono estas malutila al Britia ekonomia forto.

Reuters raportis el Parizo en la dua de aŭgusto ke influjaj rondoj en Francio sentas same pri komercado

kun Ĉinio kiel Britio kaj rekte kontraŭas al la sinteno de Usona Ŝtat-sekretario, John Foster Dulles, pri ĉi tiu problemo. Ĝi ankaŭ antaŭdiris, ke Francio probable proponos la moderigon de limigoj al komercado kun Ĉinio, kiujn ĝi antaŭe konsentis, en diskutado kun la Usona registaro.

Movado en Japanio

En Japanio, la postulo por komercado kun Ĉinio atingis grandecon de popolamasa movado. "Parlamentaria Ligo por akceli komercadon kun Ĉinio," enhavanta preskaŭ duonon de la membroj de ambaŭ Ĉambroj de la Parlamento, estas organizita. La 29-an de julio, nur du tagojn post la subskribo de la Armistika Kontrakto en Koreio, la Malsupera Ĉambro de la Japana Parlamento akceptis rezolucion kiu rekomendis ke "la japana registaro devas tuj malstreĉi la limigojn al komercado inter Japanio kaj la Ĉina Popola Respubliko, por ke en la plej proksima estonteco ĝi estu metita sur sama bazo kiel komercado kun Okcidenta Eŭropo," kaj ke "por faciligi ĉi tiun komercadon, vojaĝaj limigoj devas esti moderigitaj kaj taŭgaj aranĝoj faritaj por akceli ĉina-japanan komercadon." En la sekvanta tago, la 30-a de julio, la Supera Ĉambro akceptis similan rezolucion.

Nura "malstreĉo" de limigoj estas kompreneble ne sufiĉa por ebligi ĉina-japanan komercadon disvolviĝi kiel ĝi devas. Sed la rezolucioj spegulas certajn aspektojn de ekonomia situacio en Japanio kaj la deziron de la japana popolo sin liberigi el la katenoj sur komercado kiujn la japana registaro surmetis sub Usona premado.

Indonezia Opinio

Komercado kun Ĉinio ankaŭ fariĝas slogano en la ĉefaj landoj de Sudorienta Azio. Tuj post la ĉeso de la korea milito, D-ro Asmaunan, estro de la Eksterlandkomerca Sekcio de la Indonezia Ministerio de Ekonomiaj Aferoj, faris jenan aserton, kiel raportis *Singapore Tiger News*, "Komerca rilato kun la Ĉina Popola Res-

Ĉinaj silko kaj silkaĵo amasiĝas sur la kajo por eksportiĝi.



publiko estas gravega, kondiĉe ke ĝi estus normale kondukata post la nova armistico. Indonezio povas profiti el la komercado." Similan opinion esprimis en la 10-a de aŭgusto la nova Ministro de Financo, Ong Eng Die, kiu esprimis la esperon ke la korea armistico havos favoran influon sur Indonezia komercado kun eksterlandoj, precipe kun Ĉinio.

Usonaj Motivoj Malkovritaj

Du aspektoj de la Usona politiko de embargo kaj atencita blokado jam fariĝis tre klaraj al la landoj koncernaj. Unue, estas evidente ke Okcidentaj landoj bezonas komercadon kun la Oriento kaj ke ĉi tiu bezono fariĝas pli urĝa kiam la ekonomia krizo disvolviĝas. Due, multaj Okcidentaj komercistoj lernis el sia propra sperto ke la politiko de embargo estas utiligata de Usono por subfosi la konkurforton de siaj rivaloj kaj establi sian propran superregadon super la kapitalista mondmekato.

Por Libera Komercado

El multaj partoj de Eŭropo kaj Sudorienta Azio aŭdiĝas protestoj kontraŭ Usonaj manovroj de ĉi tiu

tipo. Ili iras manon en mano kun la intensigita postulo por la forigo de la homfaritaj obstrukcoj kiuj baras la vojon al urĝe bezonataj merkatoj. La teno de la Usona polpo sur la monda komercado estas malfortiganta. La popoloj de Okcidentaj landoj pli kaj pli malinklinas subigi al Usono sian suverenan ekonomian rajton de komercado kun kiuj ajn ili volas. Ili pli kaj pli konscias, ke estas en ilia intereso havi interprofitigajn komercajn rilatojn kun Sovetunio, Ĉinio kaj aliaj Popolaj Demokratioj.

La sanaj ekonomioj de la landoj de socialismo kaj popola demokratio ne estas ĝenataj de ekonomia krizo. Ili estas ĉiufanke kreskantaj, kaj ilia kapacito por komercado kun eksterlandoj estas pligrandiganta.

Konstante ekspansianta komercadon inter si, ili ne dependas de la kapitalista merkato. Sed ĉiu el ili, inkluzive Ĉinion, volas kaj kapablas disvolvi komercadon kun la Okcidentaj landoj. Kaj tia komercado certe kreskos kiam la homfaritaj baroj estos forigitaj.

Mallongige tradukita el *China Reconstructs* No 6, 1953.

Literaturaj Atingoj de Nova Ĉinio

—Resumo de la raporto de fama verkisto Maŭ Dun, ĉe la Dua
Reprezentanta Konferenco de la Ĉinaj Literaturaj
Laborantoj je la 25a de septembro, 1953—

En Ĉinio liberigita, la nova, energiplena socia vivo donis al literaturo novan enhavon kaj formon, ŝanĝis la rilaton de literaturo kun popolamaso kaj kulturis novan, vivoplenan trupon de literaturistoj. Kompare kun la pasinteco, en la ĉina literaturo jam okazis ŝanĝo evidenta kaj granda.

Tiu ĉi ŝanĝo kaj disvolviĝo montriĝis, antaŭ ĉio, en la enhavo de la literaturaĵoj, en iliaj materialoj kaj temoj, kaj en la kreado de novaj figuroj. Ĉiuj reakciaj, putraj ideoj en literaturo, inkluzive de feŭdaj kaj koloniaj ideoj, kiuj enfiltriĝis longtempe en la ĉinan literaturon, estas nun fundamente likviditaj. Jam perdis sian pozicion en literaturo la literaturaĵoj de burĝa individuismo, liberalismo kaj arto por arto. En la brilo de komunisma ideo, la ĉina literaturo vivecas kaj plenas de senlima memfido kaj optimisma spirito pri la konstruado de nia patrolando kaj la liberigo de la homaro. Sekve de tio la horizonto de literaturo kaj la en ĝi spegulita vivsfere estas multe pli vastaj ol en la pasinteco.

Laŭ nia nekompleta statistiko, el la ĉ. 2,000 noveloj, skizoj, raportoj kaj dramoj publikigitaj en la ĉefaj gazetoj kaj ĵurnaloj tra la lando kaj filmoj prezentitaj dum la pasintaj kvar jaroj, ĉ. 400 temas pri industria produktado kaj laborista vivo, ĉ. 400 pri klasbatalo en la kamparo kaj kamparana vivo, ĉ. 300 pri la Kontraŭjapana Milito, Liberiga Milito kaj batalo rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion, ĉ. 300 pri armea vivo kaj rilato de armeo kun popolamaso, ĉ. 70 pri la vivo kaj batalo de naciminoritatoj kaj ĉ. 200 pri aliaj sociaj movadoj kaj demokrataj reformoj. Kvankam la statistiko estas ankoraŭ ne kompletaj, tamen jam

evidente videblas la grandega ŝanĝo en la literaturo de nova Ĉinio kompare kun tiu de la pasinteco. El la riĉa, bolanta vivo kaj batalo de la popolamaso de nia patrio, ni verkistoj ĉerpis diversajn subjektmaterialojn kaj novajn temojn, kreis diversajn novajn figurojn, kaj pere de tio spegulis la ĉiufankajn, novajn aspektojn kaj la perspektivon de la patrio. Antaŭ kelkaj jaroj ĉi tiuj subjektmaterialoj kaj temoj malmulte aŭ tute ne aperis en la ĉina literaturo.

Inter la verkoj lasttempaj aperis ne malmulte da sukcesaj kaj kompare distingindaj. Ekzemple, *Fera Muro* (novelo de Ljoŭ Ĉing), priskribas intiman kunlaboron de kamparanoj kun la Popola Liberiga Armeo en Liberiga Milito, ilian venkon super malfacilaĵoj kaj ilian subtenon al la fronto kaj kreis brilajn figurojn de simplaj laboremaj kaj sinoferemaj kamparanoj kadroj. La filmo *Ŝtala Batalanto* kaj la dramo *Mi Kreskis en Batalo* montris la noblajn kvalitojn de la batalantoj de la PLA en la Liberiga Milito: kuraĝeco, nesubigebleco kaj ekstrema lojaleco al revolucio. La raportoj el Koreio de Ba Ĉin, *Kiuj Estas la Plej Amindaj Homoj* (de Ŝej Ŝej) kaj multaj aliaj bonaj skizoj, raportoj kaj rakontoj prezentas la noblajn kvalitojn de alta internaciisma-patriotisma spirito kaj miriga heroismo de la batalantoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. La Stalin-premion gajnintaj noveloj *La Suno Brilas super Sanggan-rivero* (de Ding Ling) kaj *Ŝtormo* (de Goŭ Li-bo) kaj opero *Blankhara Knabino* (de Ho Ĝing-ĝi kaj aliaj) spegulas profunde kaj vivece la grandan agraran reformon kaj la ŝanĝon de la rilato inter la klasoj kaj kreis novajn, admirindajn figurojn de la kamparanoj. La dramo *Antaŭ Novaj Aferoj*

(de Du Jin) elmontras la batalon inter la fortoj progresema kaj konservativa en la reformo de entreprenoj. Ĉiuj ĉi tiuj verkoj atingis certajn sukcesojn kaj donis vastan edukon efektan inter la popolamaso.

Speciale menciinde estas, ke unufoje en la historio de Ĉinio aperis literaturaj verkoj kies subjekt-materialoj ĉerpigis el la vivo de naciminoritatoj kaj kies herooj estas la progresemluloj inter ties laborantaj popolanoj. La nova vivo de unueco, harmonio kaj feliĉo de la naciminoritatoj en Ĉinio pli kaj pli speguliĝas en literaturo. Multaj el ili estas bonaj verkoj. Jam aperis brilaj junaj verkistoj naciminoritataj.

En niaj verkoj aperis amaso da novaj figuroj: batalherooj el la PLA kaj la Ĉinaj Popolaj Volontuloj, labormodeloj en fabrikoj kaj kamparo, membroj de la Komunista Partio kaj Novdemokratia Junula Ligo, novtipaj virinoj kaj geknaboj. Ili aperas ne kiel tiaj subprematoj kaj ekspluatatoj kiaj en la verkoj de la pasinteco sed kiel mastroj de la vivo kaj kreantoj de nova Ĉinio.

Sekve de tio, ankaŭ la rilato inter literaturo kaj la popolamaso rimarkinde ŝanĝiĝis. Nia literaturo pli kaj pli akiras la prizorgon kaj subtenon de la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj pli grandiĝis la sfero de la populariĝo de literaturo. Literaturo kaj arto fariĝis ilia grava idea armilo en ilia vivo. La eldonnombro de literaturaj libroj pliiĝis dek-dudekoble ol antaŭ liberigo. En 1952 la film-rigardantaro atingis pli ol 600,000,000 rigardant-fojojn. Literaturaj kaj artaj agadoj ĝenerale disvolviĝis en fabrikoj, vilaĝoj kaj armetruoj. Multaj verkoj estas reskribitaj de la popolamaso en popularajn operojn kaj dramojn. Ili ankaŭ skribis multe da kantrakontoj, baladoj kaj kantoj. Tiuj laborantaj popolanoj, kiuj ne aŭ tre malmulte kontaktis literaturajn kaj artajn verkojn en la pasinteco, fariĝis jam hodiaŭ fundamentaj legantoj kaj rigardantoj. La sinteno de la vasta legantaro al la literaturaj verkoj tute aliĝis. Ili arde prizorgas kaj subtenas la verkadon de la verkistoj. Niaj verkistoj kaj la redakcioj de ĉiuj literaturaj gazetoj konstante ricevis grandajn kvantojn da leteroj, kiuj donis valorajn opiniojn pri verkoj.

Antaŭ kvar jaroj ni ankoraŭ ne havis unuecan kōnon pri la literatura direkto "servi al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj"; kaj parto de la verkistoj eĉ havis erarajn opiniojn, kaj sekve naskiĝis la disputado ĉu estas nepre necese ke laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj estu herooj kaj pozitivaj figuroj en verkoj. Ankoraŭ troviĝis tiam multaj verkistoj kies ideologio estis nepura kaj kies starpunkto estis ne firma. En 1951 rilatigite kun la kritiko kontraŭ la reakcia filmo *La Vivo de U Ŝjun* kiu propagandis feŭdisman, sklavan ideon, disvolviĝis tra la lando varma tajdo de kritiko kaj memkritiko pri la ideologio de verkado; kaj surbaze de tio en 1952 komenciĝis landskala kampanjo de ideologia ĝustigo en literatura-arta rondo, kiu pluapase kritikis la burĝan kaj et-burĝan ideologiojn en literaturo. Samtempe kun tio la verkistoj klopodis profunde sperti la vivon kaj reformi sian ideologion. Lasttempe disvolviĝis lernado de socialisma realismo en diversaj lokoj kaj ankaŭ el tio rikoltiĝis certa rezultato. Dank' al tiu serio da lernado, kritiko kaj memkritiko, unueciĝis la ideologio, celo kaj paŝoj de nia anaro kaj plifortiĝis nia solidareco. La novaj verkistoj antaŭenpuŝis la malnovajn per siaj viveco kaj vicleco, kaj tiuj ĉi lastaj helpis la novajn



Maŭ Dun faras raporton ĉe la konferenco

per siaj verk-spertoj. La malnovaj verkistoj ĉiuj konis la gravecon de sinstarigo ĉe la flanko de la laborista klaso, profundigo en la vivon de popolamaso, reformo de ideologio kaj servo al la popolo; ili konis la fakton ke la intereso de la laborista klaso koincidas kun tiu de la nacio. Ĉiuj verkistoj—ĉu kompartiaj aŭ nekompartiaj, ĉu laborist-kamparanoj aŭ etburĝodevenaj, ĉu junaj aŭ maljunaj—unuigis sub la sama celo, kaj sekve plifirmiĝis nia solidareco.

La pasintaj kvar jaroj estis ankaŭ la jaroj kiam niaj novaj batalantoj iom post iom plimultiĝis. Laŭ nekompeta statistiko, post la liberigo eldoniĝis en libroformo en la lando 256 romanoj kaj noveloj, 159 poemoj, 265 dramoj, kaj 896 skizoj kaj aliaj verkoj. Se ni enkalkulus tiujn kiuj aperis sur diversaj gazetoj kaj ankoraŭ ne eldoniĝis libroforme la cifero estus ankoraŭ pli granda. La plejparto de la verkistoj de tiuj multaj verkoj estas nove bakitaj. Atentinde estas ke la verkoj de la laborista-kamparanoj verkistoj estas bonvenigataj de la popolamaso. La formiĝo kaj disvolviĝo de tiu nova trupo en la literatura fronto spegulas la grandecon de latent forto en ĉina literaturo. La plejparto el ĉi tiuj nove bakitaj verkistoj estas junuloj. Kvankam iliaj verkoj estas ankoraŭ ne maturaj, tamen ili venis el laborista-kamparana amaso, estis harditaj en batalo, bone konas kaj arde amas la laborantan popolon, havas akran senton por novaj aferoj kaj figuroj kaj havas senliman konfidon pri la nepra venko de la konstruado de nia patrio kaj socialisma reformo. Sub la kulturado de la Komunista Partio kaj la popolo ili havas grandan perspektivon, kaj ĉefe dank' al ĉi tiu nova trupo kreskos la socialisma, realisma literaturo de Ĉinio.

La supre-menciitaj atingoj de literaturo kaj ĝia profunda kaj granda ŝanĝo klarigas, antaŭ ĉio, la fak-

(daŭrigo sur p. 270)

Por Speguli la Grandiozecon de Granda Epoko

Nia Korespondanto

La Dua Tutĉinia Konferenco de Verkistoj kaj Artistoj okazis en Pekino inter la 23a, septembro, kaj la 6a, oktobro, 1953. La 560 delegitoj kaj 189 observantoj, kiuj kolektiĝis en la halo Hŭajjentang, kunvenejo de la plej altaj konsiliĝaj organizoj de la lando, venis el ĉiuj lokoj kaj nacioj en la lando, kaj el Koreio kie multaj el ili laboris kun la Ĉinaj Popolaj Volontuloj. Eminentaj verkistoj de multjara reputacio kaj junaj laboristoj kaj kamparanoj kiuj ĵus komencis literaturan agadon; dram-verkistoj kaj dram- kaj operludistoj de klasika kaj moderna stiloj; film-verkistoj, -direktantoj kaj -aktoroj; komponistoj, muzikistoj, popol-baladistoj kaj -rakontistoj; literaturaj tradukistoj; pentristoj, skulptistoj kaj karikatelistoj; kritikistoj en ĉiu sfero—ĉiuj estis ĉi tie por diskuti kiel servi pli bone al la popolo. La Konferenco daŭris du semajnojn kaj oni resumis la atingojn kaj difektojn de la pasintaj kvar jaroj kaj difinis la taskojn por la estonteco.

Kunvenante en la halo Hŭajjentang, multaj el la partoprenantoj ankoraŭ povis rememori la Unuan Tutĉinian Konferencon de Verkistoj kaj Artistoj, kiu havis lokon en la sama halo en julio, 1949. La delegitoj al tiu konferenco venis, en granda momento kiam triumfo kronis la centjaran revolucion lukton de la ĉina popolo kontraŭ imperiismo kaj feŭdismo, al la nove liberigita Pekino. Kelkaj venis el la malnovaj liberigitaj regionoj kaj kelkaj el la urboj ĵus elirintaj el la inkubo de Kuomintang-a teruro. Ĉiuj unuigis sub la klariona alvoko de Maŭ Ze-tung al la laborantoj en literaturo kaj artoj—turni sian talenton kaj penon al la servo al

(daŭrigo de p. 269)

ton ke la progresema ideologio de la laborista klaso havas definitivan gvidan pozicion en la literatura afero de Ĉinio. La prizorgo kaj gvidado de la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ Ze-tung pri la literatura movado, precipe la direkto de la Centra Komitato de la Partio pri la kritiko kontraŭ *La Vivo de U Ŝjun* en 1951, havas specialan signifon por disvolviĝo de ĉina literaturo dum la lastaj jaroj. Nur sub la gvidado de la ideologio de la laborista klaso kaj la politiko de la Komunista Partio la literatura movado povas disvolviĝi laŭ ĝusta vojo.

Tamen ĉi tiu granda ŝanĝo kaj nova atmosfero en ĉina literaturo kiuj estiĝis ekde 1949 estas nur komenco. Kompare kun la rapida konstruado de politiko kaj ekonomio, la senĉesa plibonigo de la vivo de la popolo kaj la postulo de la popolamaso por literaturo, nia literatura laboro ankoraŭ postlasigis malproksime post la realo. En plej bona okazo ni povas nur diri ke ni jam metis la unuajn fundamentŝtonojn por pli bona plenumo de la nova tasko. Sekve ni literaturistoj kaj artistoj ankoraŭ devas klopodi kun duoblaj fortoj por verki pli multe da pli bonaj verkoj por speguli nian grandan heroan epokon.

la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de la revolucia armeo.

La medio de la Dua Konferenco montris la grandegan distancon, kiun la ĉina popolo trapasis en kvar jaroj. Ĉinio troviĝas ĉe nova turna punkto en sia historio. La granda kaj malfacila laboro por revivigi la nacian ekonomion jam estas plenumita. La lando jam marŝas sur la vojo al industriigo, al la socialisma transformado de sia ekonomio, sia tuta socia strukturo kaj kulturo. Do venas la novaj taskoj de verkistoj kaj artistoj por la nuna tempo.

La ĝenerala direkto por la transiro de Ĉinio al socialismo estis klarigita en parolado de Ĉefministro Ĉou En-laj al la Konferenco. Li alvokis la verkistojn kaj artistojn daŭrigi kaj plenumi ankoraŭ pli efike la politikon servi la laboristojn, kamparanojn kaj popolajn batalantojn; partopreni la aktualan ĉiutagan laboron de la popolo; plialtigi la artistan nivelon kaj produkti pli da verkoj; krei bonajn literaturajn kaj artajn produktojn kun korekta ideologia enhavo kaj helpi disvolvi la literaturajn kaj artajn agadojn de la popolamasoj mem.

En sia raporto pri la atingoj de la pasintaj kvar jaroj, Ĝou Jang, Vicprezidanto de la Tutĉinia Federacio de Literaturaj kaj Artaj Rondo, elmontris la ĉefajn konkretajn problemojn kiuj alfrontas la verkistojn kaj artistojn. Tiuj fariĝis la centra temo de diskutado inter la partoprenantoj en la Konferenco.

La unua estis la disvolvo de kreiva verkado, precipe la bildigo de pozitivaj herooj, la kreantoj de nova Ĉinio. "Niaj verkistoj," Ĝou Jang diris, "ankoraŭ ne sukcesis krei tipojn de elstaraj, pozitivaj figuroj. Multaj verkoj suferas pro la difektoj de abstrakta ĝeneraligo, aŭ de skribado laŭ malvarmaj formuloj." Ĝou Jang emfazis ke por plenumi tiun taskon la verkistoj kaj artistoj devas mem partopreni la lukton inter la malnova kaj la nova—kaj prezenti ĝin en siaj verkoj. "Profunda scio pri la politiko de la Komunista Partio kaj la Registaro, la movforto de la disvolviĝo de la lando kaj popolo, devas esti kunigata kun fidela kaj varm-kora pentrado pri vivo."

La dua problemo estis la ĝusta rolo de literatura kritiko. Ĝou Jang diris ke se nur la verkistoj aŭ artistoj staras ĉe la flanko de la popolo, la kritikisto devas trakti iliajn verkojn kun zorgo de amo, elmontrante difektojn por helpi ilin fari korektojn sed neniam sin kontentigante per nura denunco. Sole en tiu ĉi maniero kritiko helpas kaj kuraĝigos, anstataŭ obstrukci, la kreeman disvolviĝon de la verkisto aŭ la artisto. La verkistoj kaj artistoj, siaflanke, devas nek timi kritikon nek ignori ĝin.

La ĝusta asimilo de ĉina kultura heredaĵo estis ankaŭ emfazita en la raporto. Ĝou Jang postulis reeldonadon de la riĉa, populara kaj realisma parto de tiu heredaĵo kaj profundan esploron koncerne ĝin. La



Ĝoŭ Jang faras raporton al la Dua Tutĉinia Konferenco de Verkistoj kaj Artistoj

verkistoj kaj artistoj devas lerni utilajn lecionojn de la ĉinaj majstroj de la pasinteco kaj de la grandaj popolaj verkistoj kaj artistoj de ĉiuj landoj en ĉiuj epokoj.

Fine, la raporto preparolis la necesajn organizajn aranĝojn por faciligi la plenumadon de tiuj taskoj. Inter tiuj aranĝoj estis la akceptado de nova statuto por la Federacio, kaj la liberigo de kiel eble plej granda nombro da verkistoj kaj artistoj el administra kaj alia laboro, tiel ke ili sin dediĉu al krea agado.

Post aŭdo de aliaj paroladoj, la Konferenco eniris en tutan semajnon da apartaj kunsidoj de la komponaj organizoj de la Tutĉinia Federacio—la asocioj de verkistoj, dramverkistoj, muzikistoj, dancistoj kaj laborantoj en grafikartoj. Ĉiu detale pridiskutis, kun speciala atento pri sia propra agado, la ĝeneralajn problemojn kiuj sin prezentis.

Maŭ Dun, fama novelisto kaj Prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Verkistoj, faris paroladon esprimante kontenton pri tio ke la verkistoj ĉerpis siajn subjektajn materialojn el la riĉa vivo de la popolo kaj pri la nombro de novaj verkistoj aperantaj. "La novaj verkistoj, per sia junece vivforto, agas kiel impulso por la malnovaj verkistoj, kaj la lastaj, siavice, helpas la novajn per siaj spertoj," li diris. Elmontrante ke, "la tasko de literaturo ne estas limigita nur en la fidela priskribo de kompleksaj ŝanĝoj; antaŭ ĉio, ni devas helpi antaŭenpuŝi tiun ĉi socialisman transformadon per povo de arto," Maŭ Dun faris penetran analizon de la grava problemo krei pozitivajn figurojn. Li diris ke, krom se la verkistoj konas vivon kaj mastras marksismo-leninismen, ili ne povas vidi ion en ĝia tuteco, kompreni la hodiaŭajn kaj morgaŭajn realojn aŭ fariĝi mastroj de socialisma realismo.

Ding Ling, gajninto de la Stalin-premio por Literaturo pro sia novelo pri agrara reformo, *La Suno Brilas super Sanggan-rivero*, en sia neformala parolo urĝis ĉiujn verkistojn paroli al la popolo per pli multaj kaj pli bonaj verkoj. Ŝi konsilis ke, por krei tipajn figurojn, la verkistoj devas havi multajn intimajn amikojn inter la popolo, amikojn kiuj venas al ili kun sia ĝojo kiam ili ĝojas kaj kun siaj plendoj kiam la aferoj ne bone iras.

La profundaj radikoj de la arto kaj literaturo de nova Ĉinio en ĉiu sfero de vivo kaj la plifortigita unueco de la junaj kun la plej bonaj el la maljunaj, estis klare videblaj ĉe la personoj kiujn oni vidis en la halo.

Ĉi tie estis ĉinaj verkistoj kiuj plenumas gvidrolon en la mondpaca movado: Kuo Mo-jo, gajninto de la Internacia Stalin-premio por Paco, Maŭ Dun, la poeto Emi Siaŭ. Ĉi tie ankaŭ estis la novelistoj Ding Ling, Ĝoŭ Li-bo kaj dram-verkisto Ho Ĝing-ĝi, ĉiuj gajnintoj de la Stalin-premio por Literaturo.

El la batal-frontoj de heroo Koreio venis la poeto Ŭej Ŭej, aŭtoro de *Kiuj Estas la Plej Amindaj Homoj* kaj aliaj inspirantaj skizoj pri la Ĉinaj Popolaj Volontuloj; la pentristo kaj lignogravur-artisto Gu Ĵŭan; la verkisto Lju Baj-ju, kiu nun laboras super film-verko pri iu volontulo ĉe la fronto kaj lia edzino en ilia hejmi-vilaĝo.

Inter multaj verkistoj kaj artistoj kiuj venis el la fabrikoj kaj movo-plenaj konstruejoj de la unua kvin-jara plano de Ĉinio estis la verkistino Caŭ Ming, aŭtorino de *La Mova Forto*, la dram-verkisto Tu Jin, la film-verkisto Ju Min, la pentristo Ŭang Ŝi-ĝŭo kaj la skulptisto Su Huj. La lastaj kvar pasigis multajn monatojn en la "ŝtal-urbo" de la lando, Anŝan.

La poeto Aj Ĉing, la novelistoj Gaŭ Ŝu-li, Gu Ju kaj multaj aliaj venis de vilaĝoj, kie ili vivas kun la kamparanoj, kreante verkojn kiuj montras la novajn aferojn kaj novajn homojn tie. Gaŭ Ju-baŭ, juna batalanto el la vicoj de kamparanoj, reprezentis la novan generacion de verkistoj eledukiĝintaj en tiu granda lernejo, la Popola Liberiga Armeo. Antaŭ la liberigo, li estis tute analfabeta. Nun li jam publikigis gravan aŭtobiografian romanon.

Estis notinda trajto de la Konferenco ke ĝin partoprenis multaj verkistoj, artistoj kaj muzikistoj el ĉinaj naciminoritatoj.

Inter la multaj gastoj ĉe la Konferenco estis membroj de kulturaj delegacioj el Rumanio, Ĉeĥoslovakio kaj Pollando, la Viceprezidanto de la Asocio de Germanaj Verkistoj, Stephan Hermlin, la Kuba poeto, Nicholas Guillen, kaj aliaj.

La organizitaj verkistoj kaj artistoj de Ĉinio hodiaŭ kreskas en nombro kaj en vasteco de reprezento. Kio

Nova Pekino en Konstruado

Ĉen Ting-joŭ

Pekino, urbo bela, majesta kaj kun longdaŭra historio, eniris periodon de rapida rekonstruado, fronte la novajn postulojn al ĉefurbo de nova Ĉinio.

Nova Pekino, kun la malnova urbo kiel sia centro, ekspansiĝas ĉiudirekten. La nova, pli granda Pekino kovros areon dekoble tiun de la malnova urbo kiu havas 62 kvadratajn kilometrojn, kaj ĝia loĝantaro, kiu nombras nun 2,700,000, duobliĝos. La konstruado estas efektivigata laŭ tuteca plano. Tio evitas la hazardan kreskon kiu faras multajn urbojn de kapitalismaj landoj senkarakteraj amasoj da konstruaĵoj kun domaĉoj por laborantaj popolanoj.

Popola Ĉefurbo

La malnova Pekino estas unika inter la urboj de la lando. La nova Pekino heredis ĝiajn imponajn palacojn, altajn, grandajn urb-turojn, elegante planitajn ŝton-pontojn super lagoj kaj kanaloj, ĝardenojn kun belaj domoj, pavilonoj kaj koridoroj kaj diversformajn templojn, altarojn kaj pagodojn. Ĉiu el ili estas individua artaĵo kaj harmonie lokiĝas en grupo da konstruaĵoj.

Sed la malnova Pekino entute estis konstruita laŭ la bezono de la feŭda kortego. Ĝi devas esti radikale transformita por kontentigi la postulojn de kreskanta popola ĉefurbo. La originala plano havas 8-kilometre longan aks-linion kurantan ĝuste norden kaj suden, ĉirkaŭ kiu staras la palacoj de la imperiestroj kaj temploj kaj altaroj de iliaj prauloj kies grandiozezo estis utiligata por timigi la popolon. Irante de unu fino de Pekino al la alia ordinaraj homoj trovis grandan maloportunecon ĉirkaŭirante vastan malpermesitan areon en la koro de la malnova Pekino. Ĉirkaŭ kaj en la urbo estas multaj urb-muroj kaj du tranĉekanalaj kiujn la feŭdaj regantoj konstruis por protekti sin kontraŭ atako. Hodiaŭ, escepte de tiuj partoj utiligeblaj, ili jam fariĝas obstrukcoj en la vojo de la disvolvigo de la urbo.

Kiam la militaristoj kaj imperiistoj anstataŭis la feŭdan kortegon de la malnova Pekino, tiaj modernaj

aranĝoj kiel asfaltitaj stratoj, elektro, akvokondukado, sistemo ktp. estis enkondukitaj, sed nur en la loĝkvartaloj de riĉuloj kaj potenculoj en la orienta kaj okcidenta partoj de la urbo. Dume la laboranta popolo amasiĝis en kadukaj domaĉoj sur urb-borderaj stratoj.

En la pasinteco Pekino estis tipa urbo de konsumantoj. Ĝis antaŭ la liberiĝo Pekino havis nur malmulte da industrio kaj komerco estis limigata al importado. Kelkaj delikataj metiartoj estis kulturataj, sed nur por la ĝuo de la ekspluatanta klaso.

La konstruo de nova Pekino fundamente reformos ĉi tiun urbon laŭ novaj principoj. Ĝi disvolvos modernan industrion. Ĝia konstruado celas servi al produktado kaj al la laboranta popolo. La malnovaj, belaj kaj majestaj konstruaĵoj kun kultura valoro estos elektitaj kaj konservataj kiel harmonia parto de la novaj konstruaĵoj por plibeligi la urbon. La konstru-laboro kiu nun progresas en Pekino jam komencis konkrete elmontri la planon de ĝia estonta disvolvigo.

Novaj Kvartaloj

Pekino, urbo kun glora kaj antikva kultur-heredo, fariĝos unu el la plej grandaj modernaj kultur-centroj en la mondo. Antaŭ ne longe, nur malmultaj konstruaĵoj punktis la sorgo-kampojn kiuj etendiĝis rekte ĝis la nordokcidentaj urbomuroj de Pekino. Hodiaŭ tiu ĉi areo aliformiĝas en grandan centron por scienca kaj kultura trejnado kaj esploro. Dudek kvin universitatoj, teknikaj kaj politikaj lernejoj kaj kvin esplor-institutoj estas konstruataj aŭ plivastigitaj. Ducent dudek mil kvadrataj metroj da nova plankspaco estas konstruata ĉijare por ses teknikaj institutoj de geologio, ŝtalo kaj fero, oleo, mino, aeronautiko kaj industrio. En la estontaj kvin jaroj, la plankspaco de loĝejoj kaj aliaj domoj por tiuj ses institutoj preskaŭ kvarobligos tiun ciferon.

Okcidente de la urbo, alia nova kvartalo estas kreskanta. Ambaŭflanke de du larĝaj avenuoj, centoj da mult-etaĝaj oficejoj kaj apartamentoj staras meze

(daŭrigo de p. 271)

unuigas ilin estas la fido pri la elektita vojo de la lando al socialisma industriigo, gvidata de la Komunista Partio kaj la Popola Registaro. Tio speguliĝis en la rezolucioj de la Konferenco, la akceptado de nova statuto de la Federacio, la konsisto de ĝia nove elektita plenum-komitato el 103 membroj, estrata de Kuo Mo-ĵo, Maŭ Dun kaj Ĝoŭ Jang.

En la posttagmezo de la 4a de oktobro, kiam la suno hele brilis super la bela ĝardeno malantaŭ la halo Hŭaj-jentang, la delegitoj kaj observantoj renkontiĝis kun la gvidantoj de la Partio kaj Registaro, estrata de ilia plej bona instruisto kaj kamarado, Prezidanto Maŭ Ze-tung. La *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kun-sido en Jen'an* de Prezidanto Maŭ kaj liaj aliaj klasikaj verkoj estas la gvidstelo de kultura laboro en nova Ĉinio. Dum multaj jaroj, li prizorgis la taskojn

de ĉinaj verkistoj kaj artistoj, donante al ili kuraĝigon kaj direkton.

El sia dua tutlanda konferenco, la verkistoj kaj artistoj de Ĉinio akiris freŝan inspiron en siaj gloraĵoj kaj honoraj taskoj. Ilia memfido kaj decido estas bone esprimita de la novelisto Ĝoŭ Li-bo, kiu diris:

"La plej grandaj periodoj de la ĉina historio estas tiuj de Han (206 a.K.—220 p.K.) kaj Tang (618-907 p.K.). En tiuj tagoj la ĉina kulturo floris brile kaj prospere. Sufiĉas ke ni pripensu kiom da eminentaj poetoj kaj artistoj aperis en tiuj du dinastioj. Sed nia epoko estas multe pli granda ol Han kaj Tang! Ni certe kreos multe pli riĉan kulturon!"

For de la Konferenco la partoprenantoj reiris en la mezon de la popolo, al la frontoj de socialisma konstruado—konsciantaj pri sia misio speguli la grandiozan realon de la plej granda epoko de Ĉinio—la epoko de Maŭ Ze-tung.

de arbaro da konstru-trabaroj kaj ferbetonaj skeletoj. Tiu ĉi areo ankaŭ estis kovrita per grenplantaĵoj antaŭ unu aŭ du jaroj. Nun, pulsante per la ritmo de betonmiksiloj, arganoj kaj aliaj sonoj de konstruado, ĝi transformiĝas en centron de oficejoj kaj loĝejoj.

Pekino ne plu estos urbo de konsumantoj. La nord-orienta, suda kaj sudorienta antaŭurboj kreskos en kvartalojn industriajn. Nun multaj fabrikoj kaj iliaj dependaj domoj estas en konstruado. Inter ili estas unu kotonteksejo kun plankspaco de proksimume 90, 000 kvadrataj metroj. Ĝi estas unu el la dek grandaj teksejoj nove konstruitaj depost la liberigo. La konstruota Pekina Maŝinfabrika Fabrikaĵo produktos ĉiujare pli ol 2,000 diversspecajn frez-maŝinojn kaj estos pli granda ol kiu ajn maŝinfabrika en Pekino.

Okcidente de Pekino kuŝas la fama Somera Palaco kaj la pitoreskaj Okcidentaj Montoj. Ĉi tie estos Pekina ĉefa centro de ripozhejmoj kaj vizitindejoj. En la pasinteco, tiuj lokoj estis ekskluzive plezurgejoj de la reĝaj familianoj; nun ili fariĝis vizitindaj lokoj por la laboranta popolo. Pli kaj pli da sanatorioj, hospitaloj kaj someraj ripozhejmoj estas konstruataj ĉi tie. Unu el ili estas la tuberkuloza hospitalo kiun la Ĉina Studenta Unuiĝo konstruas, je la komisi de la Internacia Studenta Unuiĝo, por studentoj el ĉiuj partoj de Azio.

Interne de la Urbomuroj

La distrikto interne de la malnovaj urbomuroj de Pekino estos la centro de la nova urbo. Multaj novaj oficejoj, loĝejoj, lernejoj, hospitaloj kaj aliaj institutoj jam aperis aŭ estas levigantaj en la malnova urbo, kies konstruado haltis por multaj jaroj. La areo proksime de Tien An Men (Ĉielpaca Pordego), la simbolo de nova Ĉinio kaj la koro de la urbo, daŭre estos la poli-

tika centro de la lando. Ĉi tie estas la centraj institucioj de la Popola Registaro kaj la Komunista Partio.


Ĉe la suda fino de Tien An Men placo, Monumento por la Falintaj Popolaj Herooj estas nun konstruata. Ĝia fundamento estis inaŭgurita de Prezidanto Maŭ Zetung mem. Ĝi altas 36.5 metrojn. Sur la bazo troviĝos dek grandaj bareliefoj kiuj bildigos la heroajn agojn de ĉina popolo en la revoluciaj bataloj dum la pasinta jarcento, precipe dum la Kontratajpana Milito kaj la Liberiga Milito.

Pekino, la popola ĉefurbo, estas urbo gastama. Multaj hoteloj kaj gastejoj estas konstruitaj aŭ konstruataj ĉijare. Tio ebligas afablan akcepton al tiuj kiuj venas de ĉiu angulo de Ĉinio por partopreni kunvenojn aŭ por turismo; al la multaj fremdlandaj gastoj kiuj venas por paco kaj amikeco kaj por antaŭenigi la interflon de kulturo kaj komerco; kaj al la Sovetiaj specialistoj kiuj venas por helpi Ĉinion en landa konstruado.

En la pasinteco, estis tre malmultaj amuzejoj en la suda kaj norda partoj de la urbo kie ĉefe loĝas la laboranta popolo. Kaj ili estis nek puraj nek komfortaj. La malnovaj estas nun renovigitaj kaj kvar novaj teatroj kaj kinejoj estas konstruataj tie.

Post la liberigo la Popola Registaro konstruis dekojn da miloj da ĉambroj por la laboristoj kaj tio solvis unuapase ilian loĝ-problemon. Multaj stagnaj lagoetoj kaj rubejoj malutilaj al la sano de la loĝantaro estas transformitaj en naĝejojn, glitkurejojn aŭ parkojn. Preskaŭ ĉiuj malfermaj kloakoj estas anstataŭitaj per subteraj. La akvokonduka sistemo nun servas al ĉiuj loĝantoj de la urbo.

En tiu ĉi jaro, estos konstruita en Pekino plankspaco de 2,700,000 kvadrataj metroj. Tio estas kvinono



Skiza mapo montranta kiel Pekino ekspansiĝos.

de la spaco antaŭe konstruita en la urbo. Sepdek procentoj de la novaj domoj estas konstruataj per ferbetono aŭ miksaĵo de tia materialo.

Feliĉo por Loĝantaro

Laŭ la konstru-plano de la nova Pekino, krom aranĝoj konvenaj por la loĝantaro, oni metas plej grandan atenton al la arta unueco de la konstruaĵoj kaj ilia karakteriza nacia stilo. La konstruaĵo de nova Pekino harmonie spegulas la vivon kaj penson de la popolo de nova Ĉinio. Dum la konstruado la arkitektoj ankaŭ aplikas la Sovetian principon, t.e. prizorgi la diversajn postulojn de la loĝantoj. Ĉiu pordo kaj fenestro estas aranĝata konforme al la bezono kaj komforto de la loĝantoj. En la planado de ĉiu aro da domoj, sufiĉa spaco estas ĉiam retenata por ĝardenoj kaj publikaj placoj.

Pekino jam estas verda urbo. En la estonteco ĝi estos ĝardena urbo. Laŭ la nova plano, la Imperia Palaco, la Ĉiela Altaro, la Ĝunghaj-, Nanhaj- kaj Bejhaj-lagoj, la Somera Palaco, la Jad-fonta Monto kaj la Okcidentaj Montoj—ĉiuj tiuj historiaj vidindaĵoj estos interligataj per avenuoj kaj riveroj, formante reton da ĝardenoj. Por ebligi navigacion kaj boatpromenadon, la tranĉe-kanalo ĉirkaŭ la urb-muroj estos plilarĝigita ĝis 50 metroj kaj sur ĝiaj ambaŭ bordoj troviĝos verdajoj. La urbo estos ĉirkaŭata de verda zono da densaj arboj, legom-ĝardenoj kaj paŝtejoj. Sur la Okcidentaj Montoj, forst-zono kun kvindek milionoj da arboj estas nun kulturata por transformi la naturan ĉirkaŭaĵon de Pekino.

Nova Strat-sistemo

Akorde kun la disvolviĝo de la urbo, multaj stratoj estas jam konstruataj kaj multaj estas riparitaj aŭ plibonigitaj. Pli ol 210 kilometroj da novaj stratoj estos konstruitaj ĉiutage kaj tiu ĉi longeco, aldonita al tiu de la stratoj konstruitaj en la pasintaj tri jaroj, unu- kaj duon-oble superas la tutan longecon de tiuj stratoj konstruitaj dum la kvardek jaroj antaŭ la liberigo.

KURANTAJ AFEROJ

Ŝanhajaj Fabrikoj Superplenumis Planon

Pli ol 60 ŝtataj malpez-industriaj fabrikoj en Ŝanhajo superplenumis sian planon de 1953, kiu celas pliprodukti kaj ŝpari 400,000 milion juanojn laŭ valoro. Sole la nutraĵo- kaj tabako-fabrikoj jam atingis tiun celon. La tuta sumo estos espereble multe pli granda kiam ciferoj venas de la fontoplumo-, kaŭĉukaĵo- kaj medikamento-fabrikoj.

Multaj metodoj estis aplikataj de la laboristoj dum tiu ĉi kampanjo pliiĝi produkton kaj praktiki ekonomion. La produkto en la ŝtata Ŝanhaja Penicilin-fabriko pliiĝis 55 procentojn pro plibonigita tekniko. La produkto por la kvara jarkvarono espereble pliiĝos de 7,000 milion al 12,000 milion juanoj laŭ valoro.

Ŝanhajo Akiras Krudan Feron Loke Produktitan

Maanŝan, fer-centro najbare de Ŝanhajo, sendis sian unuan ŝarĝon da kruda fero al la fera kaj ŝtala industrio de tiu urbo, la 27an de oktobro. Kiam ĝia produktado plene restariĝas, la Maanŝan-a fer-fandejo

Multaj kotaj stratetoj en la urbo ankaŭ estas asfaltitaj.

Novaj kvartaloj estos interligataj kun la centro de la urbo per larĝaj ĉefaj vojoj, tiel ke la loĝantoj tie, krom ĝui siajn lokajn publik- kaj kultur-aranĝojn, povos facile viziti la teatrojn, kinejojn, kultur-palacojn, kaj magazenojn, kooperativojn kaj ĉiovendejojn en la urbo-centro.

Long-distancaj veturiloj kun alta rapideco kuros sur la ĉefstratoj por garantii sekurecon kaj kvieton al la areoj de publikaj institutoj kaj loĝejoj. Sur la malpli gravaj ĉefstratoj veturos aŭtobusoj kaj elektraĵ omnibusoj, kaj ĉirkaŭ la urbo kuros tramoj. Laŭ la bezono de la estonta disvolviĝo de Pekino, subtera fervojo estos konstruata por interligi la gravajn punktojn de la urbo kaj solvi komplete la komunik-problemon.

Bona Akvo-provizo

Por multaj jaroj Pekino suferas pro nesufiĉo de akvo kaj ĝi ankaŭ ne havas akvovojojn. Trinkakvo estas nur akirebla el putoj aŭ malgranda lago en la okcidenta antaŭurbo. Tamen, tiu ĉi problemo estos baldaŭ fundamente solvita. Sur la supra parto de Jungding-rivero 100 kilometrojn nordokcidente de Pekino, Gŭanting-akvokonservejo estos finkonstruita en la venonta jaro. Krom malebligi superakvegion, irigacii kamparon kaj generi elektro-povon, la konservejo kun areo de 230 kvadrataj kilometroj provizos sufiĉe da akvo al Pekino. Tunghŭej-rivero oriente de Pekino estos ankaŭ pliprofundigita kaj plilongigita tiel ke vaporsipoj povos veturi de la ĉefurbo al Tienzino, la plej granda komerca urbo en Norda Ĉinio. Tio multe malplialtigos la transportajn kostojn kaj faciligos la komercan kaj industrian prosperiĝon de nova Pekino.

Pekino marŝas antaŭen kune kun la rapida progreso de nova Ĉinio. Neniam antaŭe ĝi tiel elmontris la gigantan forton kaj profundan saĝecon de la ĉina popolo kiel hodiaŭ. Kaj neniam antaŭe ĝi aperis tiel juna, granda kaj bela kiel nun.

sendependigos Ŝanhajon de fero venanta el malproksimeco.

Du renovigitaj blov-fornejoj kiuj komencis funkcii respektive en septembro kaj oktobro povas produkti pli ol trioble tiom da kruda fero kiom dum la japana okupado. Kvar aliaj blov-fornejoj estos rekonstruitaj ĉe la fino de tiu ĉi jaro.

Nordokcidento Havas Novan Elektrejon


Ĉiuj maŝinoj estas instalitaj en la unua aŭtomata termoelektrejo de Sinkiang, la plej malproksima okcidenta provinco de Ĉinio, du monatojn antaŭ la fiksita dato. Kiam tiu ĉi nova elektrejo en Tihŭa, la provinca ĉefurbo, plene funkcios, ĝi provizos 1.4-oble kiom la nuna elektro-povo.

Sufiĉe da elektro estos produktata por plenumi la bezonon de la fabrikoj kaj minejoj en kaj ĉirkaŭ la urbo.


Tiu ĉi nova elektrejo, projektita laŭ Sovetia desegno kun helpo de Sovetiaj specialistoj, estas aŭtomata de karbo-enmetado ĝis povo-produktado. En kazo de difektiĝo, helpa instalaĵo aŭtomate anstataŭos la ĉesigitajn maŝinojn kaj daŭrigos la laboron.

KURANTAJ AFEROJ

La Unua Senjunt-tuba Fabriko de Ĉinio Ekfunkcias




La unua senjunta tubo produktita de la fabriko trapasis la tubigan maŝinon. Ĝi estis dediĉata al Prezidanto Maŭ Ze-tung.




Sub la gvidado de Sovetiaj specialistoj, Anŝan-aj laboristoj lernas manipuli la komplikajn ekipaĵojn de tiu ĉi aŭtomata fabriko.


La unua aŭtomata senjunt-tuba fabriko de Ĉinio, en Anŝan, Nord-orienta Ĉinio, produktis sian unuan tubon je la 27a de lasta oktobro. Tiu ĉi fabriko estas monumento al Ĉinia-Sovetia kunlaboro. Ĝi konstruiĝis en 15 monatoj per la helpo de Sovetiaj specialistoj, kaj ĝi estas ekipita per la plej modernaj aŭtomataj ekipaĵoj el Sovetio.

Vidajo de supre laŭ longe de la granda fabriko.



Iu teknikisto trejnas laboristojn por la nova fabrik





Novaj domvicoj levigas unuj post aliaj en la ĉirkaŭurbo de Pekino kaj ĉiu nova konstruaĵo alportas novan loĝantojn. Jen sperta laboristo de iu konstruejo klarigas al vizitantaj junaj pioniroj kiel belan ĉefurbon.

NOVA PEKINO EN KONSTRUKTO

Pekino, urbo bela kaj antikva, kie sidas la Centra Popola Registaro de la Ĉina, kaj okazas gravaj eventoj de mondhistoria signifo, estas nun sub grandskala konstrua ekspansiigo. Kun siaj antikvaj palacoj, temploj, turoj, lagoj kaj parkoj intertrankviligaj, modernaj konstruaĵoj de ĉina tradicia stilo, ĝi certe fariĝos urbo ankoraŭ pli bela.


Ĉefa ĉanta Ĉang'an-strato, unu el la ĉefstratoj de Pekino, kun siaj novaj domoj kaj vastaj kurejoj por aŭtoj kaj tramoj.

Tradicia stilo karakterizita per novan oficejan klubon kaj aliajn novajn domojn.





Ĝojon al la ĉefurbaj
ili havos.



En la kultura kaj scienca centro, multaj domoj jam finkonstruiĝis kaj multaj aliaj estas konstruataj aŭ konstruotaj. Jen unu el la 25 universitatoj en konstruado.


KONSTRUADO

popola Respubliko
konstruado kaj rapide
akomplikitaj inter la
jaroj bela.


126 tiaj etaĝaj loĝejoj
formis novan loĝ-
kvartalon en la norda
antaŭurbo.

as' tiun ĉi
iel multajn
n Pekino.

Orfiŝa Baseno, unu el la malpuraj
marĉoj en Pekino, transformiĝas en
belan parkon.




Nova vojo konstruiĝas apud la malnova palaco
faciligi la trafikon de la urbo al la Soma
Palaco.






Z. A. Gavrilovna, Sovetia teksa specialisto, klarigas pri la manipulado de nova Sovetia maŝino al la laborist-lernantoj en iu aŭtomata lin-fabriko en Harbin, Nordorienta Ĉinio.



Sovetia specialisto Moisejev helpas membrojn de ole-esplora grupo en Seĉuan-provinco.

SOVETIAJ SPECIALISTOJ EN ĈINIO



Du Sovetiaj specialistoj Fjedorov kaj Mordovskij montras al laboristo de la Ĉinia-Sovetia Ŝipkonstrua Kompanio en Dajren kiel manipuli aŭtomatan lutilon.

Gvidate de Sovetia specialisto, metal-laboristo en la Dajren-a Fervoja Fabriko, Nordorienta Ĉinio, praktikas la Sovetian metodon de altrapideca tranĉado kiu estas vaste popularigata inter ĉinaj tornistoj.



La frata helpado donita de la Sovetia popolo estas grava faktoro en la ekonomia konstruado de nova Ĉinio. Sovetiaj specialistoj, en nobla spirito de internaciismo, senrezerve transdonas siajn valorajn spertojn en socialisma konstruado al ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj.

Por Ĉinia-Sovetia Amikeco

Gaŭ Ŝi-ŝan

Vasta ekspozicio montranta la ekonomiajn kaj kulturajn atingojn de Sovetio malfermiĝos en Pekino venont-aŭtune ĉirkaŭ la kvina datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Konstruado de la ekspoziciaj haloj kaj tereno jam komenciĝis en la okcidenta ĉirkaŭturbo de la ĉefurbo.

La 15an de oktobro, ŝton-tranĉistoj, beton-metistoj, ĉarpentistoj, masonistoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj reprezentantoj de la diversaj popolaj organizoj en Pekino kolektiĝis ĉe la konstruejo kie, dum la ceremonio, Peng Ĝen, Urbestro de Pekino, inaŭguris la fosadon por la metado de la fundamento de la ekspoziciaj konstruaĵoj.

La Soveti-ekspozicia centro konstruiĝas laŭ la plano de la Sovetiaj arkitektoj V. S. Andrejev, akirinto de Stalin-premio kaj K. D. Kislova kaj la Sovetia inĝeniero, L. M. Gohman, ankaŭ akirinto de Stalin-premio. Ĝi okupas 101 hektarojn da tero kaj la tuta volumeno de la konstruaĵoj estos ĉirkaŭ 200,000 kubmetroj. Kiam kompletigitaj, la ekspoziciaj haloj mem estos ekspoziciaĵo. Ili formos aron da belegaj konstruaĵoj reprezentantaj la brilajn atingojn de Sovetia arkitekturo.

La Centra Parto

Al la sudo frontos la granda enirejo de la ekspozicia centro. Ĝi konsistos el kolonaro kun 16 arkajoj, ĉiu dekoraciata per la nacia emblemo de unu el la 16 Unuiĝaj Respublikoj de la USSR. Tiu ĉi rigardos al ronda korto ĉirkaŭata de floroj kaj arboj. En la centro de la korto elsprucos fontano dekoraciata per 16 skulptaĵoj simbolantaj la 16 Unuiĝajn Respublikojn. Sur ambaŭ flankoj de la fontano stariĝos du 30 metrojn altaj flagstangoj, sur kiuj flirts la naciaj flagoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj Sovetio.

Kupola halo, kun diametro de 30 metroj kaj alteco de 19.5 metroj, estos la centro de la ekspoziciaj konstruaĵoj. Ĝiaj plafono kaj muroj ornamigos per freskoj. Ĉi tie estos ankaŭ grafikaĵoj kaj diagramoj ilustrantaj la atingojn de Sovetio en diversaj kampoj de nacia konstruado kaj bildoj spegulantaj la diversajn stadiojn de la vivo kaj bataloj de la Sovetia popolo. Grupo da skulptaĵoj simbolantaj la grandan kaj nerompeblan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetio stariĝos en la norda fino de la halo.

Super la kupolo de ĉi tiu halo leviĝos bela turo kun la nacia emblemo de Sovetio sur sia fronto. La turpintaĵo estos orumata kaj portos supre kvinpintan ruĝan stelon kies plej alta punkto estos pli ol 80 metrojn super la tero. Ĝi videblos jam de multajn mejlojn malproksime.

Industrio kaj Agrikulturo

Norde de la centra halo estos la plej granda ekspoziciejo—Halo de Industrio. En ĉi tiu halo alta je 19.5 metroj kaj larĝa je pli ol 40 metroj ekspoziciigos pez-industriaj produktaĵoj de Sovetio, precipe produktaĵoj de maŝinfabrika kaj tornil-fabrika industrioj.

Vizitantoj povos vidi ĉi tie diversajn plej novtipajn tornilojn, kanelilojn, rabotilojn kaj aliajn maŝinojn kaj ankaŭ la ekipaĵojn en diversaj branĉoj de malpeza industrio kaj la nutraĵo-industrio.

Sur libera spaco ambaŭflanke de la Halo de Industrio gigantaj driloj, kambajnoj, traktoroj kaj la plej novtipaj aŭtomobiloj estos elmontrataj en efektiva fankiado.

Okcidente de la centra halo situos Halo de Agrikulturo. Ĉi tie elmontriĝos specimenoj de la ĉefaj agrikulturaj produktaĵoj de Sovetio. Vizitantoj povos vidi la grandajn sukcesojn atingitajn de la kolektivaj kaj ŝtataj farmoj de Sovetio en plialtigo de la produktokvanto de grenoj, industriaj krudmaterialoj kaj brutproduktaĵoj. Ĉi tie ankaŭ estos klarigataj la plej lasttempaj sukcesoj en brutobredado kaj agrikultura scienco, manifestante la superecon de la grandskala socialisma agrikulturo de Sovetio kompare kun malgrandaj kamparanaj farmoj kaj grandskala kapitalisma agrikultura produktado.

Halo de Kulturo kaj Arto

Oriente de la centra halo estos Halo de Kulturo kaj Arto, kie ekspoziciigos la atingoj en la kampoj de kulturo, eduko, literaturo, grafika arto, skulptado, aplikita arto, arkitekturo, kaj aliaj. La ekspoziciaĵoj enhavos multajn reproduktaĵojn de pentraĵoj de elstaraj Sovetiaj pentristoj, verkojn de klasikaj rusaj verkistoj kaj nuntempaj Sovetiaj aŭtoroj kaj modelon de la 32-etaĝa domo de la Moskva Ŝtata Universitato nomita laŭ M. V. Lomonosov. Tiuj ĉi ekspoziciaĵoj ilustros la senprecedencan kreskon de socialisma kulturo kaj arto en Sovetio.


Kinejo kun 850 sidlokoj estos konstruata por la montrado de la plej lasttempaj Sovetiaj filmoj en la ekspozicia centro. Malantaŭe de la Halo de Industrio estos liberĉiela teatro kun sidlokoj por 3,000 homoj por ludado de dramoj kaj prezentado de filmoj. Troviĝos ankaŭ restoracio de rusaj manĝaĵoj.

Speciala relvojo estos konstruata de Ŝjigimen-stacio ekster okcidenta pordego de Pekino al la ekspoziciejo. Tiu ĉi linio estos utiligata por transporti konstrumaterialojn dum la konstruado de la haloj. Post la finkonstruo de la haloj ĝi estos utiligata por la elmontrado de diversaj tipoj de Sovetiaj lokomotivoj movigataj per vaporo aŭ elektro, kaj la plej novaj tipoj de Sovetiaj pakajo-, ŝarĝo-, kaj pasaĝero-vagonoj. Tiuj ĉi konatigos al la ĉina popolo la atingojn de la Sovetia popolo en fervoja konstruado.

Kun sia ĉielskrapa turpintaĵo portanta la ruĝan stelon, la tuta Sovetia ekspozicia centro memorigos al la ĉina popolo Kremlon kaj ĝiajn turojn kun brilantaj steloj kiuj simbolas feliĉon, pacon kaj amikecon inter la popoloj.

Entuziasmaj Konstruantoj

Terlaboro kaj beton-laboro jam komenciĝis sur la konstruejo. Miloĵ da laboristoj nun sin okupas per



Sub la helpado de Sovetiaj specialistoj rapide disvolviĝas la konstrua laboro de la ekspoziciejo.

laboro tage nokte en tri labor-vicoj. Kolonoj da ŝarĝaŭtoj kaj ĉaroj ŝarĝitaj per brikoj, ŝtonoj kaj gruzoj, marmoro kaj ligno fluas al la konstruejo de ĉiuj direktoj.

La konstruantoj laboras kun alta entuziasmo, ĉar ĉiuj konsideras granda honoro la partoprenon en ĉi tiu laboro de Ĉinia-Sovetia amikeco. Kampanjo por plenumo kaj superplenumo de la konstru-planaj jam vigle disvolviĝas.

Kurantaj Aferoj

Agrikulturaj Kooperativoj Kreskas en Norda Ĉinio

Agrikulturaj produktaj kooperativoj en Norda Ĉinio jam pliiĝis je pli ol 3 $\frac{1}{2}$ obloj ol unu jaron antaŭe. Nun ili nombriĝas pli ol 6,000 kaj la membraro konsistas el 120,000 kamparanaj familioj.

Preskaŭ ĉiuj tiuj kooperativaj farmoj sukcesis konsiderinde altigi siajn grenproduktojn ĉijare. Ekzemple en Ĉangĝi-regiono en Ŝansi-provinco, kie troviĝas ĉ. 1,000 kooperativoj, plejparto de ili havis ĉijare pli riĉan rikolton ol lastjare. Unu el tiuj ĉi farmoj rikoltis 750 kilogramojn pli multe da greno pohektare ol la meznombra rikolto de interhelpa grupo en la najbareco. Kooperativa farmo en Fengjun-gubernio, Hopej-provinco, rikoltis 25 procentojn pli da greno pohektare ol la lokaj kamparanoj rikoltis meznombro.

Ĉiuj ĉi tiuj rezultoj plie konvinkis la unuope kulturantajn kamparanojn pri la efikeco de organizita terkulturo kaj donis freŝan impeton por la plua kresko de la kooperativa movado de terkulturo.

Unuigita administrado ebligas la kooperativajn membrojn plibone utiligi kampojn kulturante plej konvenajn plantaĵojn laŭ la diferencaj specoj de grundo. Labordivido liberigas la krean energion de la kam-

La nuna tasko estas kompletigo de 100,000 kubmetroj da terlaboro kaj 10,000 kubmetroj da beton-laboro antaŭ la alveno de malvarmega vintro. Ĉang Hung-ŝun, estro de konstruo, Ĉaj Ĝju-ŝji, ĉefingenerio, Li Ju, prezidanto de la sindikata grupo kaj ĉiuj aliaj laboristoj, ingenerioj kaj teknikistoj kredas ke ili povas plenumi ĉi tiun taskon.

Samtempe, preparoj estas ankaŭ farataj por daŭrigi la konstruadon tra la vintro. Sub la direktado de la bonekonata Sovetia ingenerio, L. M. Gohman, ĉiuj tiuj sinokupantaj pri la laboro estas lernantaj Sovetiajn metodojn de konstruado sub vintraj kondiĉoj. Ili klopodas tutforte por finkonstrui ĉi tiun ekspozician centron frutempe kiel konvenan lokon, kie la vastaj ĉinaj popolamasoj povos vidi la grandajn atingojn de la Sovetia popolo en komunisma konstruado—la morgaŭo de la nova Ĉinio.

La malfermo de ĉi tiu ekspozicio pri Sovetiaj kulturaj kaj ekonomiaj atingoj estos grava evento en la vivo de la popolo de Pekino kaj de la tuta lando. Ĉi tiu ekspozicio, kiel Urbestro Peng Ĝen diris ĉe la fundament-meta ceremonio, havos grandan signifon en tio ke ĝi informos la ĉinan popolon pri la progreso de socialisma konstruado en USSR. Ĝi helpas al la studado de progresaj Sovetiaj spertoj kaj pluapase plifortigos la amikecon inter la ĉina kaj Sovetia popoloj. La Sovetia ekspozicia centro ankaŭ donos grandan helpon al la planita ekonomia konstruado kiu nun disvolviĝas en Ĉinio.

paranoj-membroj. Per praktiko de ekonomio la kooperativoj povas plialtigi siajn enspezojn. Tio ebligas al ili uzi pli multe da sterko, aĉeti pli bonajn terkulturojn kaj apliki aliajn sciencajn rimedojn.

Norda Ĉinio estas unu el la pli frue liberigitaj regionoj en Ĉinio kaj havas multjarajn spertojn en interhelpa terkulturo. Tio ĉi estas grava faktoro por la ĉijara sukcesa kresko de la pli progresinta kooperativa movado de terkulturo en tiu regiono.

Pli da Pamiraj Infanoj Vizitas Lernejojn

Infanoj de la 20,000 tajik- kaj halhas-minoritatoj de du gubernioj sur la Pamiroj en sudokcidenta Sinkiang nun vizitas naŭ regulajn lernejojn aŭ iliajn 38 filiojn.

Tiuj ĉi du naciminoritatoj, loĝantaj 4,500 metrojn super marnivelo, sendis en lernejojn 2,200 infanojn ĉi-aŭtune. Tiu ĉi nombro estas pli granda ol tiu en ĉi tiu printempo, kiam tajik-aj lernejoj estis 7-oble kaj halhas-aj lernejoj estis 22-oble tiom kiom antaŭ liberigo.

Krom la regulaj lernejoj, troviĝas ankaŭ moviĝantaj lernejoj, kiuj kuniradas kun la paŝtistoj en la printempo tiel ke iliaj infanoj povas havi tutjaran edukadon.

Kurantaj Aferoj

Vivo Komenciĝas je la Aĝo de 62

Lan Tjan

Por homo en mia aĝo, nenio estas pli granda feliĉo ol reaktiro de juneco. Mi estas 66-jara fervoj-konstrua inĝeniero. Ĝis la liberigo en 1949 mia tuta labor-vivo estis serio da senesperigoj. Estis nur tiam kiam mi pasigis mian sesdekduan naskiĝtagon, ke mi povis fine komenci la laboron kiun mi ĉiam volis fari. Pli poste, la popolo min elektis labormodelo. Lastan someron, kiel delegito al la Sepa Tutĉinia Kongreso de Sindikatoj, mi estis sur la observa stadiono por Pekina Majtaga parado kaj vidis Prezidanton Maŭ.

Fizike, mi fariĝis pli forta. Dum esplora vojaĝo, mi ofte piediras tridek aŭ pli ol tridek kilometrojn ĉiutage. Mi povas eĉ manĝi nuksojn ĝuste kiel junuloj, per la nova artefarita dentaro kiun mi akiris sub la Labor-Asekura Regularo. Tiu sama regularo, krome, provizas eksiginton je sesdek-jara aĝo per bona pensio. Sed la renaskiĝo de la lando kaj popolo, kiu ankaŭ alportas renaskiĝon de persona espero, estas pli bona medikamento ol ekiĝo, kiom ajn aĝa oni estas. Mi povas ĝin rekomendi.

Forpasis jam pli ol kvardek jaroj de kiam mi fariĝis studento en lernejo funkciigata en Ĉengtu de la Korporacio de Seĉuan-Hankou-a Fervojo, kiu estis kune posedata de privatuloj kaj la tiama registaro. Mi eniris ĝin nur pro malriĉeco; ĝi provizis senpage loĝejon, manĝon kaj instruadon, kion ordinara mezlernejo ne faris. Poste, la Korporacio sendis min al granda industria instituto en Norda Ĉinio, ankaŭ senpage. Ĝia celo estis trejni junulojn por konstrui fervojojn en mia hejmprovinco Seĉuan. Sed kiel tiel ofte okazis en malnova Ĉinio, la plano renkontis multajn obstaklojn kaj neniam efektiviĝis. Mi mem, tamen, havigis al mi decidon kiu restis kun mi por la tuta vivo: iam, iel konstrui fervojojn por Seĉuan-a popolo.

Serio da Malsukceso

Post diplomigo en 1916, mi laboris en diversaj partoj de la lando. Multajn jarojn poste, subite mia revo ŝajne estis realiĝonta. En 1932, mi partoprenis esploran grupon por mallarĝa fervojo de Ĉengtu ĝis Ĉungking, kies konstruon volis kelkaj lokaj militaristoj. Sed ili estis tro okupataj per internaj militoj por ĝin efektivigi.

Dum la Kontraŭjapana Milito, Kuomintang komencis paroli pri linio inter Ibin en sudokcidenta Seĉuan kaj Kunming en Junnan-provinco. Du jaroj estis elspezitaj por la esplorado, kiun mi partoprenis. La nura rezulto estis la konstruo de ĉirkaŭ 150 kilometroj da mallarĝa fervojo norde de Kunming.

Post la malvenko de Japanio en 1945, Kuomintang proklamis ke la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo fine estos konstruata. Ĉifoje mi fariĝis asista ĉefinĝeniero en la konstrua buroo. Plena de espero, mi laboris tage kaj nokte super desegnoj kaj landkartoj. Poste mi trovis ke kelkaj partoj de la planita linio iris kontraŭ racia praktiko. Kiam mi atentigis pri tio, neniu ŝajne aŭskultis min. Mia protesto al la buroestro eliris la jenan respondon: "Tiu ĉi estas la norma linio. Mi prenos sur min la respondecon. Vi faru kion mi diris al vi."

Elserĉante la kialon mi trovis ke tiu ĉi oficisto kaj aliaj ĉirkaŭ li nur klopodas enpoŝigi monon el la ŝveligita konstru-budĝeto kiun la "norma linio" necesigis.

Post kiam mi komprenis ke la fervoja projekto estis neniom diferenca de iu ajn alia Kuomintang-a entrepreno, mi tute senkuraĝiĝis kaj nur sidis ĉe mia skribotablo kaj legis kiajn ajn paperojn metitajn tie. Mia nova maksimumo estis pasigi la fiksitajn horaron ĉe la oficejo, kaj teni mian buŝon fermita. Tia malaktiva sinteno estus severe kritikata hodiaŭ kiel ĝi ja tion meritas. La fakto estas ke, en la malnova socio, multaj intelektuloj kaj teknikistoj estis muelitaj en tian sintenon.

Nova Komenco

Venis liberigo. Mi daŭre laboris en la buroo kiu estis poste reorganizita en la Sudokcidentan Fervoj-konstruan Buroon. La bona disciplino de la Popola Liberiga Armeo, la entuziasmo de la komunistaj kadroj kaj ilia intima rilato kun la popolo tuj impresis min. Sed mi ankoraŭ havis unu demandon kiu min longe ĝenadis: "La komunistoj povas venki la malamikojn, sed ĉu ili povas mastrumi produktadon?" Kaj la kadroj, kiel faktoj montris, ja sciis tre malmulte pri teknikaj aferoj. Sed diference de la Kuomintang-aj burokratoj, ili estis tre modestaj homoj, kaj neniam hontis demandi pri aferoj kiujn ili ne komprenis. Tio gajnis mian fortan simpatian. Mi ne plu estis "silentulo" kaj komencis helpi ilin.

En 1950, la Popola Registaro anoncis ke la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo estos konstruata. Komencante labori super tiu ĉi projekto je la tria fojo en tridek jaroj, mi sciis ke la laboro plenumiĝos—tio kion mi jam vidis montris ke la komunistoj estas homoj kiuj faras kion ili diras.

Progreso kontraŭ Konservativismo

Kiam la malnovaj Kuomintang-aj planoj estis prenitaj por konfirmo aŭ revizo, mi elmontris ke la sekcio inter Ĉengtu kaj Ĝjanĝang en ĝia sudoriento, povas esti konsiderinde mallongigita. Tuj post kiam mi faris tiun ĉi proponon oni aranĝis por mi esploran grupon por kontroli mian proponon sur la koncerna loko. La junaj membroj de la grupo varme subtenis la ideon—kiu ŝparos monon kaj materialojn por la lando. Sed ankaŭ troviĝis aliaj kiuj ne vidis unu colon antaŭen de sia nazpinto. Ilia ĉefa argumento estis ke la nova projekto postulas konstruon de 500-metra tunelo. "Niaj superuloj lasas al maljuna Lan Tjan fari tiun ĉi ĉason de sovaĝ-antero ĉar ili ne volas vundi lian sentimenton," ili diris unu al la alia.

Por malebligi ke tiu ĉi nerespondeca sinteno al la esplora laboro kompromitu mian planon, mi mem daŭre traesploris la linion. Estis la konstanta entuziasmo de la junaj fervojistoj kiu fine kronis la esploron per sukceso. Vidante ilian spiriton, mi pli kaj pli deziris transdoni miajn tutan scion kaj sperton al la nova



La verkinto esploras por la konstruo de la Ĉengtu-Ĉungkinga Fervojo.

generacio—kiu havas la memfidon, volon kaj kapablon por etendi fervojojn al ĉiu angulo de Ĉinio.

Speciala kunveno de la administracio kunvokigis por taksi la nove desegnitajn linion. Tie ĉi la debato leviĝis denove. Kelkaj inĝenieroj kiuj planis la malnovan linion sub Kuomintang obstinis kontraŭ ĝi. Ili ŝajne pensis ke ilia profesia prestiĝo difektigis se iliaj planoj estus iel ŝanĝitaj. Ili ripetadis ke la tunelo komplikus la laboron kaj bezonus ekstran tempon. Mia respondo estis ke ankaŭ la malnova linio estas malfacila, kaj ke la nova linio estos 21 kilometrojn pli mallonga—kio sola ŝparos 115,000 milion juanojn en konstruo, jam ne parolu pri ŝparo de poste bezonataj karbo kaj aliaj funkciigaj materialoj. Krome, mi elmontris, ke la malnova linio pasis preter deklivo kiu portis signojn de grava terglito en la pasinteco kaj tio, se ripetigis, kaŭzus interrompigon de trafiko kaj eble gravajn akcidentojn. La malfruigo de kvar monatoj laŭ mia takso kaŭze de la konstruo de la tunelo estus mem pravigebla laŭ konsidero de longdaŭra intereso, kaj ĝi estus mallongigebla per bona organizo de laboro.

Mia propono estis plue kontrolita de grupo da superaj administrantoj kaj Sovetiaj specialistoj kiu inspektis la linion. Ili revenis kun forta favoro al ĝi kaj tio fine decidis la aferon. Estis la unua fojo en mia longa kariero ke mi povis fari veran kontribuon al la bonstato de la nacio, kaj mi sentis ke ĝi estas la plej feliĉa tago en mia vivo.

Ĝojo kaj Laboro

Sed mi estis ja multe pli ĝoja, kiam mi vidis lokomotivon trenanta regulan vagonaron laŭ la rekta, brilanta fervojo. Dum mi rigardadis, ĉiuj miaj memoroj rilate al tiu ĉi fervojo svarmis en mia koro: la revoj de junio, la multaj abortaj komencoj, humiliĝo ĉe la banditaj Kuomintang-aj burokratoj, ĝojaj kontaktoj kun la klopodemaj junaj esploristoj, la debato pri mia propono.... Mia koro marteladis, kvazaŭ vetkurante kun la trajno.

Tiutempe, mi kaj alia inĝeniero nomata Ĝiŝo Ji jam okupiĝis per alia esplorado por la fervojo de Ĉengtu ĝis Baŝĝi en la Nordokcidento. Ankaŭ tiu linio jam

estis desegnita en Kuomintang-aj tagoj kaj ĝia konstruo necesigus multajn altajn pontojn kaj kovrus multan montan terenon. Nia laborgrupo transpaŝis altajn montojn kaj profundajn valojn kaj transvadis multajn tumultajn riverojn. Ni ĉiuj estis ĝojaj kaj senzorgaj, kaj kiam ni vidis ke ni faris bonan taglaboron, ni ĝin celebris per vino. Ĉiu havis nur unu celon: trovi vojon por la linio kiu estos pli facila kaj pli ekonomia. Fine ni povis redesegni la linion tiel ke evitebliĝis 84 kilometroj da montvojoj, sep pli ol 30 metrojn altaj pontoj, pli ol 2,700 metroj da aliaj pontoj kaj granda kvanto da ŝton- kaj ter-laboro. Krom tio, la tuta linio mallongiĝis je 24 kilometroj. La projekto estis akceptita sen malfacilo. Ĝi ŝparis por la lando 1,200,000 milion juanojn.

La Popolo Nin Subtenas

Esplora laboro estas nun pli facila, ĉar la popolo nin helpas. Ja ne ĉiam estis tiel: en la malnova tempo la kamparanoj ne volis esti voĝgvidanto ĉar la bienuloj ilin ofte batis aŭ eĉ forpelis pro enstrudiĝo en ilian bienon. Por tion ilustru, mi rakontu du simplajn historiojn el tre multaj.

Foje, esplorante en norda Seĉuan, ni trovis ke la Siding-rivero branĉigis tie, kie la linio devis ĝin transiri laŭ la malnova mapo, en kvar fluejojn. Tio postulus konstruon de kvar pontoj kiuj longus entute 600 metrojn. Ni petis helpo de la loka kamparana asocio por trovi pli taŭgan lokon. Ili kunvokis kunvenon de membroj, sed ĉar la kamparanoj neniam vagadis laŭlonge de la bordoj, ili ne povis multon diri al ni. Tiam iu ekmemoris fiŝiston kiu supozeble plene konis la riveron. Du horojn poste, ni parolis kun li.

“Ĉu troviĝas pli taŭga transirejo ne tre fore?” demandis mi.

“Ho, jes,” li respondis sen hezito. “Ĉirkaŭ 4 kilometrojn supren estas loko kiun ni nomas ‘Anser-kolo’. Ĝi estas mallarĝa kaj la bordoj estas solidaj.” Li nin gvidis tien kaj la problemo solviĝis. Estis neniu pli bona loko, kaj tie la fervojo transiros.

Proksime de la urbo Mjanjang, ankaŭ en norda Seĉuan, ni alvenis punkton kie 1210-metra tunelo estis markita. Estis decidite, ke ni ne antaŭen iros ĝis kiam ni eltrovos ĉu la tunelo estas vere necesa. Dum ĉirkaŭesploro por eviti la tunelkonstruon, ni vidis kabanon kaj ekrapis ĝian pordon. En ĝi troviĝis ĉirkaŭ dek kamparanoj ion diskutantaj. Informiĝinte pri la celo de nia esploro, ili varme nin bonvenigis. Iu maljunulo ŝe nin invitis al sia domo. Poste ni kune ekiris, kaj li gvidadis nin por du tutaj semajnoj. La rezulto de tio estis, ke nova linio trovita ne nur evitis la tunelkonstruon sed ankaŭ ne havis krutajn deklivojn.

Poste mi ankaŭ faris esploron por la Ĉengtu-Kunming-a Fervojo. En la montoj de Sikang-provinco, en la regionoj de la Ji-nacio, ni akiris samajn helpojn. La malegoisma helpo de ĉiulokaj popolanoj min kortuŝis kaj inspiris ĉiutage.

Estas nur unu maniero por ilin rekompenci: labori pli energie kaj pli bone. Ĉu mi estas tro aĝa por tion fari? Certe ne. En montgrimpado mi ĉiam iras ĉe la fronto kaj starigas la grupon flagon sur la montpinto.

Retro-rigardante tra mia vivo, mi vidas ke mia laboro ĵus komenciĝis. Mi esperas vivi multajn jarojn pli longe en tiu ĉi nova epoko, konstrui pli multajn fervojojn, vidi urbojn, fabrikojn kaj minejojn elkreski laŭ ilia tuta longeco.

Rizo Aromas en Ĉanggoŭ-vilaĝo

Ŭang Ŝu-jen

En Ĉanggoŭ-vilaĝo de Baŭjing-gubernio, Kiangsu-provinco, la maljunuloj ne flaris la aromon de rizo en la kampoj jam kelkdek jarojn. En la kuranta jaro ĉi-tie tamen rizo elkreskis. Aŭtune oni rikoltis en la kampoj ĝenerale 150 kilogramojn da rizo po muo, kaj eĉ 300 kg. en kelkaj plej bonaj kampoj.

Ĉanggoŭ-vilaĝo situas en malalta tereno. Oriente fluas tuj apude la Granda Kanalo, kaj lagoj kuŝas okcidente kaj sude. Ordinare tia situo plej taŭgas por la kreskado de rizo. Tamen la drenilo kondukanta al la Granda Kanalo ŝtopiĝis de koto dum dekoj da jaroj kaj Ĉanggoŭ-rivero najbare de la vilaĝo ankaŭ sekigis de longe kaj en la riverujo dense kreskis sovaĝaj herboj. Tial en la pasintaj dekoj da jaroj la kamparanoj en Ĉanggoŭ-vilaĝo povis kulturi nur grenojn por seka kampo.

En 1938 la banditaro de Ĉiang Kaj-ŝek breĉis la digon de la Flava Rivero ĉe Hŭa'jŭankoŭ, la akvo de la Flava Rivero enfluis en Hŭaj-riveron kaj tiel des pli serioziĝis la inundo en la norda parto de Anhŭej- kaj Kiangsu-provincoj. Kreskadis jaron post jaro la akvo en la lago okcidente de Ĉanggoŭ-vilaĝo. En printempo la kamparanoj diligente semis sojfabojn sur la kampoj. Jen ili ekfloris kaj eligis legumenojn. Sed aŭtune ekatakis inundo el la lago. En la kampoj dronintaj en akvo la fabradikoj putriĝis, legumenoj nigriĝis, kaj disŝaŭmiĝis la espero de kamparanoj. Dum la lastaj dekelkaj jaroj en Ĉanggoŭ-vilaĝo la kamparanoj rikoltis nur unu-du-foje riĉajn rikoltojn. La kamparanoj apenaŭ povis havigi al si dufoje ĉiutage nesufiĉajn manĝojn maldelikatajn, jam ne parolu pri rizo kaj tritikfaruno. Ĉiuj perdis sian esperon en terkulturado. Dezertiĝis kampoj. Tuj kamparanoj forfuĝis aliloken.

Rememorante ĉi tiun staton, 58-jara kamparano Bjan Ŝi-ĝi de la vilaĝo diris, "Kiel malfacile ni travivis tiujn jarojn persekutate de la lupago de tero kaj suferante la atakon de inundo kaj sekegeco! Diris proverbo: Printempe oni manĝas verdajn legomojn, somere kukurbaĉojn kaj vintre karotojn. Tamen ofte, pro manko de verdaj legomoj kaj karotoj, ni povis manĝi nur sovaĝajn legomojn, k.a., kiuj estas pli malbonaj ol porkaj manĝaĵoj..." Kiam la maljunulo diris tion, liaj okuloj malsekiĝis de larmoj.

Ĉirkaŭ dekelkajn jarojn antaŭe, por barakti en la manoj de la "Sorto" la malriĉuloj en la vilaĝo proponis malŝtopi Ĉanggoŭ-riveron kaj etendigi ĝin al la Granda Kanalo por enkonduki akvon por irigacio; se venos aŭtune inundo, la rivero ankaŭ helpas forfluigi por savi kelkajn altajn kampojn. Sed pro la diversmaniera malhelpo de la bienuloj kaj reakciaj centfamilies-troj la plano restis neefektivigita. En Ĉanggoŭ-rivero la sovaĝaj herboj pli kaj pli altiĝis kaj krome aldoniĝis multaj tomboj de malriĉuloj.

Post la liberiĝo la loka organizo de la Ĉina Komunista Partio kaj la loka popola registaro multe klopodis por helpi la loĝantojn de Ĉanggoŭ-vilaĝo, dis-

tribuante grandan kavanton da savgrenoj kaj pruntedonante monon en grandaj sumoj. La kadroj de la Partio kaj Popola Registaro demandis al la vilaĝanoj: "Kian helpon vi ankoraŭ bezonas?" "Subjugon de la lago kaj konstruon de nova drenilo al la Granda Kanalo," ili respondis. "Se nur en la kampoj kreskos plantaĵoj nia vivo jam boniĝos."

La lago devas esti subjugita. Komenciĝis la subjugado de Hŭaj-rivero jam en 1950, kaj la drenilo ankaŭ estis ekkonstruata.

En la printempo de 1951, nova drenilo estis finkonstruita al la Granda Kanao. La akvo enkondukita tra la drenilo sufiĉas por la irigaciado ne nur de Ĉanggoŭ-vilaĝo, sed ankaŭ de kvar Ŝjang-oj najbaraj.

La finkonstruo de Sanho-kluzo kaj la Ĝenerala Irigacia Kanalo en norda Kiangsu-provinco—parto de la subjuga konstruado de Hŭaj-rivero—igis Hŭaj-riveron disflui obeeme al diversaj lokoj de norda Kiangsu-provinco, ankaŭ al Ĉanggoŭ-vilaĝo tra la nove konstruita drenilo kaj Ĉanggoŭ-rivero.

Sur Ĉanggoŭ-rivero denove vigle knaras la akvoĉerpiloj, kiuj silentis dekojn da jaroj. Kiel ĝoje estas aŭdi la knaradon! La aero en la tuta vilaĝo estas plena de rizaromo. Starante sur la kamparandoj kaj rigardante la fluantan akvon kaj la rizkampojn sur ambaŭ bordoj, la maljunuloj striigis siajn okulojn pro elhora rideto.

Estas nenecese priskribi kiel ĝoje kaj entuziasme la kamparanoj de Ĉanggoŭ-vilaĝo partoprenis en ĉi tiuj akvokonservaj laboroj grandaj kaj malgrandaj kaj en ĉijara agrikultura produktado. Tio estas facile imagebla. Vidante la esperon de la vivo, oni kompreneble penas kun duobla energio por ĝin realigi.

Lastatempe kiam mi alvenis ĉi tiun vilaĝon, jam finiĝis la riza rikolto. Mi loĝis en la domo de kamparano Ŭang Ŭej-ĝen. Dum manĝado la edzino de Ŭang Uej-ĝen metis antaŭ min pelveton da rizo bonodoranta, dirante, "Kamarado, bonvole manĝu kaj gustumu nian rizon ĉijare rikoltitan. Se vi venus en la pasinteco, ni ne povus vin gastigi eĉ per kaĉo el maldelikata greno!"

Ĉe la vesperiĝo mi promenis okcidenten laŭlonge de Ĉanggoŭ-rivero por viziti la vilaĝestron kaj lian patron, kiu estas konata kiel diligenta maljunulo.

Bjan Dan-jŭan, la vilaĝestro, estas ĉirkaŭ 30-jara viro. Ni parolis pri aferoj en la vilaĝo. Li diris esperplene: "La kelkdek-jara malriĉeco de Ĉanggoŭ-vilaĝo estos ŝanĝita en niaj manoj. En vintro ĉijara ambaŭbordo de Ĉanggoŭ-rivero estos fositaj ankoraŭ kelkaj branĉaj riveretoj kaj sekve en la venonta jaro trioble plivastiĝos la rizkampoj.

La patro de la vilaĝestro revenis. Ĉi tiu multe suferinta maljunulo havas belan barbon. Sidiginte, li elpoŝigis pipeton kaj komencis fumi. Kiel multaj aliaj

La Ofero al la Kuireja Dio

Ĉin Ĝaŭ-jang

La dudek trian de la dek dua monato laŭ la luna kalendaro, mi iris kontroli la prizorgan laboron por la malriĉaj armeaj familianoj dum la printempa festo en Lung'ŭan-vilaĝo kaj loĝis ĉe Onjo Ĝoŭ, ankaŭ armeana familiano. Ŝia familio tiam konsistis el tri anoj: ŝi, ŝia bofilino kaj ŝia nepino ĉirkaŭ dektrijara. La filo soldatigis antaŭ dek unu jaroj, poste aliĝis al la Popolaj Volontuloj kaj nun li batalas ĉe la korea fronto kiel batalinestro.

Antaŭe mi trifoje gastis ĉe ŝi, tial ni bone konis unu la alian. Cetere, Onjo Ĝoŭ ĉiam montris varmegan amikecon al la revoluciaj kadroj kaj ŝia bofilino Jang Ĉuej-lan estis la vic-gvidanto de la vilaĝa Virina Asocio, tial mi konsideris, ke mi povas loĝi en ŝia domo sen skrupulo dum la jarfino laŭ la malnova kalendaro.

Kiam mi eniris ŝian korton, Onjo Ĝoŭ, aŭdante la paŝbruojn, jetis rigardon tra la fenestra vitro kaj kriis:

"Jen vi venas fine, Laŭ Ĉin! Ni ĵus intencis sendi al vi buŝan komunikadon: ni malkonstruis la malnovan grenejon laŭ via konsilo kaj malkovris altvaloraĵon. Envenu rapide, ke mi montru ĝin al vi."

Mi eniris la ĉambron kaj vidis ke ĉiuj tri estas farantaj pasteĉojn sur la terlito. Ĝenjo, la knabineto, desaltis de la terlito kaj elprenis paperpecon de post spegulo sur la tablo, dirante:

"Rigardu, kio ĝi estas?"

(daŭrigo de p. 283)

maljunuloj en la kamparo li estas tre parolema. Li parolis de Ĉin-dinastio, la 'Respubliko' (la malnova 'Respubliko' de 1912 ĝis 1949), ĝis hodiaŭ. Komence li parolis kun korpremeco. Kiam li parolis pri la postliberiga vivstato, li fariĝis pli kaj pli gaja. Li ĝojis ne senmotive: la tero kiun lia familio kulturis ne donis aŭtunan rikolton dum multe da jaroj, sed ĉijare ĝi rikoltis pli ol 1,200 kilogramojn da rizgrenoj. Li diris, "En la pasinteco ni la akvon kaj timis kaj sopiris. Sed nun ni povas forteli la akvon kiam ni ĝin ne bezonas, kaj venigi la akvon kiam ni ĝin bezonas. Kun akvo je nia dispono, kial ni ne kulturos rizon? Venontjare certe pli multaj rizon kulturos ol en tiu ĉi jaro. Mi intencas venontjare starigi kune kun la familio de Ĝu Ĉang-njan budon de akvoĉerpilo por turni la akvoĉerpilon per bovo."

Kaj tiam diris la vilaĝestro: "Jes, mi aŭdis ke venontjare multaj familioj ankaŭ starigos budojn de akvoĉerpiloj. Post ĉi-aŭtuna rikolto ĉiuj havas pli da fido en produktado. Nun en la vilaĝo pliĝis ses brutoj. Kelkaj aĉetis porkojn por prepari sterkon por la venontjara produktado.

"Post 2-3 jaroj Ĉanggoŭ-vilaĝo certe prosperigos!" asertis la maljunulo. Kortuŝis min lia firma kredo pri la bela estonto. Mi rimarkis, ke lia sulkplena vizaĝo eksereniĝis—ĝi estas rido de juneco. Eĉ por la maljunuloj la vivo ŝajnas esti ĵus komencita.

Mi vidis, ke estas malnova fotografajo, kiu jam paliĝis kaj flaviĝis kvazaŭ ĝi estus iam trempita en teo. Sur ĝi oni trovis malklaran homfiguron, sed estis neeble distingi la liniojn de la vizaĝo. Ĉe unu angulo troviĝis truo tiom granda kiom fingropinto. Versajne la difekton kaŭzis brulo.

"Kies fotografajo ĝi estas?" mi demandis.

"Unue sidigu sur la terliton por vin varmigi, kaj mi diros al vi," respondis Onjo Ĝoŭ.

Mi sidigis min sur la terliton kaj helpis ilin fari pasteĉojn. Ĉuej-lan volis iri boligi akvon por pretigi al mi teon, mi sukcesis reteni ŝin nur post longa argumentado. Tiam la onjo komencis sian rakonton senorde.

"Estis en la '47a jaro, kiam la Kuomintanga armeo kaŭzis grandan domaĝon al nia loko. Tio estas fotografajo de la patro de Ĝenjo. Apenaŭ tri monatoj pasis post ĝia alsendo, malkvieto ekregis ĉi tie. Ĝenjo kaŝis ĝin en siaj libroj kaj lokis ilin en la aperturo de la terlito. Jen sin enstrudis tri Kuomintangaj soldatoj. Ili faris traserĉon tie kaj ĉi tie. Kiam ili direktis sin al la aperturo de la terlito, la stulte apudstaranta Ĝenjo, kiel viglemova infano ekkliniĝis, kaptis la kaŝitajn librojn kaj forkuris. Unu kanajlo kuris post ŝi. Kiam ŝi atingis la enirejon de la korto kaj estis jam sin ŝovanta kun unu flanko antaŭen tra la palisara pordeto, la kanajlo ekpafis. La kuglo trafis la librojn kaj gratvundis ŝian kruron. La infano preskaŭ svenis de timo. Siatepe ŝi ankoraŭ ne konsciis pri la vundo, daŭrigis la kuradon ĝis la najbara korto kaj ŝovis la fotografajon en fojnamason. La kanajlo alkuris kaj trovis nur kelkajn librojn en ŝiaj manoj. Li donis al ŝi survangojn, blasfemis kaj foriris. La infano paraliĝis sur la tero..."

Jen la onjo eksilentis, kvazaŭ la rakonto jam finiĝus. Ĝenjo faris por ŝi kompletigan aldonon:

"Poste panjo diris: 'Gardu bone la fotografajon kiel memoraĵon. Kiam via paĉjo revenos, montru al li, ke li sciu kiel suferis la popoloj!' Do mi kaŝis ĝin en la grenejo, kiun vi priparolis."

La kutimaj je kamplaboro manoj de Ĉuej-lan moviĝis lerte kaj vigle dum la pasteĉo-farado. Ankaŭ ŝi ridete aldonis intermetante:

"Post la liberigo, ni eniris la grenejon por malfermi la argilajn grenujojn kaj preni grenon. Mi diris, ke ni elserĉu la fotografajon. Ĝenjo asertis ke ĝi kuŝas en ligna skatolo ĉe murangulo. Kiam ni elterigis la skatolon, tie troviĝis nur ŝiaj libroj. La fotografajon ni ne trovis. Mi koleris tiel ke mi riproĉis ŝin forte kaj ŝi ploris. Kiam ni malkonstruis la grenejon en la 'dom-balaada' tago, diveni kio okazis! La fotografajo estis malkovrita en murfendo. Laŭ Ĉin, ni ne trovus ĝin, se vi ne donus al ni tiun konsilon!"

Duonmonate pli antaŭe mi gastis ĉe Onjo Ĝoŭ. Mi rimarkis, ke sur ŝiaj terlito kaj kestoj estis svarmo da grensakoj kaj malgrandaj argilaj grenujoj. La neamplaksa ĉambro ŝajnis treege malvasta. Poste mi eksciis,

ke troviĝas ja grenejo en ŝia domo ĉe la angulo inter la budoj por pajo kaj muelilo. Antaŭe kiam la situacio estis tre malfacila, oni ŝtopis la pordeton per brikoj kaj ŝmiris ĝin per koto, tiel ke de ekstere neniu povis suspekti. Tiel oni sekurigis la grenon de rabado. Post la liberigo oni denove malŝtopis la pordeton. Sed tiu ejo indus neniel la nomon ĉambro, ĝi estis simple anguleto. En ĉi tiu jaro la familio aliĝis al interhelpa grupo. Ĉeĵ-lan kulturis kvin muojn da riĉe produktiva maizo, kaj la ceteraj kampoj ankaŭ produktis pli multe je 10 ĝis 20 procentoj ol kutime. La ejo fariĝis tro malgranda por enteni la provizadon. Tial mi proponis: en la estonteco ĉiu jaro liveros pli multe da greno kaj la spaco de la grenejo estos ankoraŭ pli malsufiĉa por ĝin enteni, tial estus preferinde malkonstrui la etan grenejon dum la "trabalaado" ĉe la jarfino, kaj starigi, en la venonta printempo, kiam la vetero fariĝos pli milda, alian muron ĉe la flanko de la budo por pajo, enfermante pli multe da spaco, tiam oni havos pli grandan grenejon. La propono estis akceptita.

"Haha!" subite ridis Onjo Ĝoŭ. "Parolante pri la fotografaĵo, mi ekmemoras historieton. Tiam Ĝenjo havis nur ok jarojn. Iutage ŝi demandis: 'Avinjo, multaj el la patroj en la Okavoja Armeo sendis hejmen fotografaĵojn, kial mia patro ne sendis? Skribu al li, ke li ankaŭ sendu iun!' Mi diris al ŝi: 'Vi ja estas la vera portreto de via paĉjo, kiam oni vidas vin, oni vidas kvazaŭ vian paĉjon, do fotografaĵo estas superflua.' Nun rigardu, kiel rapide grandiĝis la infano!"

Ĝenjo estis preparanta pastan tegaĵon por la pasteco. Ŝi ekrulis siajn okulojn kaj parolis ridetante:

"Mi diras al vi, Kamarado Ĉin, panjo diris ke ŝi volas sendi tiun ĉi fotografaĵon al Koreio por ke paĉjo bone memoru la suferon de la popolanoj en la pasinteco kaj bone klopodu forbati la Usonajn diablojn."

Tion aŭdinte, Ĉeĵ-lan sentis embarason, ruĝiĝis kaj ĵetis riproĉan rigardon al Ĝenjo:

"Ĉion vi elbabilas, knabinaĉo!"

"Ĉu vi ne tiel parolis al mi? Ĉu ne?" Ĝenjo skuis sian hararon kaj rediris spite.

"Knabinaĉo, vi nur scipovas babiladi. Malgraŭ plurjara lernado, vi ankoraŭ ne kuraĝas skribi la novjaran versaron kaj ni devas pro tio ĝeni la instruiston!"

Ĝenjo simple ridis kluke kiel dorlotita infano. Ni parolis pri io alia. Estis jam noktigo. Onjo Ĝoŭ forlasis la terliton, lumigis lampon kaj eliris por pretigi vespermangon. Nun Ĝenjo denove babilis petoleme al sia patrino:

"Panjo, kvankam vi estas kadro de la Virina Asocio, tamen, ĉu vi kapablas fari propagandon al avinjo, ke ŝi ne oferu hodiaŭ al la kuireja dio? Ĉu vi scias? Antaŭ hieraŭ ŝi aĉetis en la foiro unu ĝin-on da sukerbuloj² kaŝante la fakton de ni. Mi kredas, ke ŝi aĉetis tion por la ofero al la kuireja dio. Sed mi ne vidis, ĉu ŝi aĉetis la ikonon³ de la dio. Ĉie mi serĉis, sed ne malkovris."

"En tiu ĉi jaro oni ne vendas ikonojn en la foiro. Ĉar ili havas nur tre malmulte da klientoj, tial oni ĉesis vendi ilin." Ĉeĵ-lan diris serioze, dume ŝi enpeniĝis kvazaŭ meditante pri io. Iom poste ŝi parolis al mi: "Laŭ Ĉin, ĉu vi povas ŝin persvadi? Ni ne sukcesis konvinki ŝin. Ŝi estas ankoraŭ tiel superŝtita en la

estanta tempo. Mi provis ŝin persvadi ĉiujare, sed tute vane."

Tiumomente Onjo Ĝoŭ puŝis flanken la pordokurtenon kaj enpaŝis.

"Kion vi du flustris, mi jam aŭdis komplete!" Ŝi kries, sed ŝia tono rivelis nenian nuancon de malbonhumoro. Finparolinte, ŝi sidigis sur la terliton, prenis pipon kaj komencis fumi ĉe la lampo.

Ĉeĵ-lan kaj ŝia filino sciis, ke ŝi tuj faros longan paroladon kaj atendis retenante sin de rido.

Fine la onjo ekparolis kiam ŝi finis la unuan pipon:

"Vi junuloj ne komprenas maljunulojn. Kiam mi estis knabino, ĉiutage purigante la kaldronon kaj kuirante, mi vidis la ikonon de la kuireja dio kaj ektimis. Mi simple timis ke li kolerus pro mia malŝparo de greno kaj destinus al mi malsaĝan edzon. Ne ridu, estas vere, ke mi neniam kuraĝis malŝpari greneron dum la kuirado. Poste mi edziniĝis al lia patro. Malsaĝa li ja ne estis, sed tiel malriĉa. Mi preĝis ĉiujare dum la ofero al la kuireja dio:

Kuireja Dio!

Kuireja Dio!

Rapide iru al la ĉielo

Kaj revenu al la tero,

Forportu malfeliĉon,

Portu al ni riĉon;

Pluvo kaj vento observu la bonan ordon

Kaj alportu riĉan rikolton;

La grenejo estu plena

Kaj la tuta familio senĉagrena,

Nin protektu la providenco

De ĉiu malbona potenco!..."

Tiel recitante, eĉ ŝi mem ne povis deteni sin de rido, la aliaj kompreneble ridegis ĝis spirperdo, eĉ la lamp-lumo komencis ŝanceliĝi.

Ŝi fumis alian pipon kaj daŭrigis:

"Mi ĉiujare preĝis kaj kotois⁴ brue. Vi ne scias, kiel kunpremiĝis mia koro, kvazaŭ iu dio kun blanka

Kurantaj Aferoj

Ŝtataj Mendoj Ekspansiigas Kantonajn Fabrikajn

64.8 procentoj de la produktaĵo de privata industrio en Kantono en la kvara jar-kvarono estos produktata sub la mendo de la ŝtato, laŭ la anonco de la Burao de Industrio kaj Komercio de tiu urbo. Dum la tria jar-kvarono la ŝtata mendo egalas 59.6 procentojn.

Plimultiĝantaj ŝtataj mendoj alportas konstantan ekspansion al la Kantona privata industrio. Laŭ taksado la valoro de la produktaĵoj de la privataj fabrikoj en tiu jaro estos la plej alta depost liberigo. Oni taksas ĝin 40 procentojn pli alta ol en 1952.

Krom havigi pli vastan merkaton al la ĉiutagaj necesaj produktaĵoj de la privataj fabrikoj, ŝtataj mendoj ankaŭ plibonigas iliajn funkciajn kondiĉojn. Rezulte de plibonigita administrado kaj reduktita produktokosto, la prezoj de trikaĵoj kaj 17 aliaj artikloj produktataj de privataj fabrikoj estis malpliigitaj antaŭnelonge.

Kurantaj Aferoj

vizaĝo kaj longa barbo starus antaŭ mi. Tiel mi pasigis kelkdekon da jaroj sed ĉiam restis malriĉa. Dum la japana invado, alvenis la Okavoja Armeo, oni propagandis por la forigo de superstiĉo. Sed, vi ne komprenas, ju pli la malordo regis, des pli kunpremiĝis la koro kaj des pli sindone oni preĝis dum la ofero al la kuireja dio. Krome, la patro de Ĝenjo forvojaĝis por rezistbatali...nu, ĉion ĉi estas superflue menci. Poste, okazis la agra reformo. Ĉiuj diris: 'Ni kultis la diojn dum la tuta vivo, sed neniuj grenoj falis el la ĉielo. Nun sub la gvido de Prezidanto Maŭ ni ricevas teron.' Tio ja estas vera. Sed estis tre strange. Ĉiujare, kiam venis la dek dua monato, mi meditis, ke ĉi-jare mi ne plu oferos al la kuireja dio, kian utilon ja alportos tia superstiĉo! Sed kiam alproksimiĝis la lasta tagdeko de la monato, mi jam ŝanceliĝis—mi kvazaŭ pekus aŭ perdis ion se mi ne oferus al la kuireja dio. La patrino de Ĝenjo klopodis min persvadi ĉiujare. Ne estis, ke mi ne volis akcepti ŝian konsilon. Sed mi... ho! mi kvazaŭ vidus blankvizaĝan kaj longbarban dion, kiam ajn mi fermis miajn okulojn... Pensu vi mem, ses ĝis sep dekoj da jaroj tiel pasis, ne estas facile transformi min en mallonga tempo!"

"Avinjo, vi jam bone komprenas, sed ĉu vi ankoraŭ oferos al la kuireja dio en tiu ĉi jaro?" Ĝenjo levis sian vizaĝeton kaj demandis petoleme.

"En tiu ĉi jaro mi ne oferos ĉiukaze!" La onjo frapigis la pipon sur la bordon de la terlito kun forto, ŝajne, ŝi jam faris sian decidon.

"... En la nuna tempo ĉio estas super via potenco ..."



*Ilustris
Gung-Ling*

"Tre bone! Bonvenon, bonvenon!" aplaudis Ĝenjo.

"Ne frenezigu, knabinaco!" Ĉiuj-lan haltigis ŝin, ĉar ŝi timis, ke la bopatrino kolerigus.

"Lasu ŝin ĝojiĝi. Tio estas justa," Onjo Ĝoŭ diris ridetante. "Mi perdis mian saĝon pro mia granda aĝo. Konsideru, se ne organizigis interhelpaj grupoj dank' al la gvido de la kadroj; se ne laborus ankaŭ la virinoj en la kampoj kaj mia bofilino ne estus tiel progresema, konsideru, ĉu ni povus rikolti tiom da greno? En tiu ĉi jaro tiu blankvizaĝa kaj longbarba dio iru al la ĉielo per si mem kaj mi ne zorgos pri li!"

"Ĉu efektive, panjo?" Ĉiuj-lan demandis, ruĝigante pro ĝojo.

"Kial ne?" Onjo Ĝoŭ klakis per la manoj. "Mi alportos la sukerbulojn, ke vi ilin formangu."

Ŝi iris malsupren de la terlito kaj elprenis paketon el inter la potamaso kaj malpakis ĝin sur la terlito.

"Mangu! La buŝo de la infano, kiu manĝis ĝin, lertiĝos por legado; la mano de la patrino, kiu manĝis ĝin, lertiĝos kaj povos skribi al sia edzo; la kapo de la laboranto, kiu manĝis ĝin, lertiĝos por bone labori por la popolo."

Ĉiuj refoje eksplodis per rido.

"Rigardu ja mian panjon, ŝi fariĝas tiel lerta je parolo!" diris Ĉiuj-lan.

Ankaŭ Onjo Ĝoŭ ekridis kaj iris al la kuirforno por hejti ĝin.

Post vespermango, la tuta familio rekomencis la pasteo-faradon. Mi sentis iom da laco pro la tutaga piedirado, iris en la okcidentan ĉambron, lumigis la lampon kaj pretis dormi post iometa legado. Onjo Ĝoŭ en venis por hejti mian terliton—sed ŝi nur aldonis du-tri faskojn da pajlo kaj eliris sen reveno dum longe. En tiu tempo, ĉiuj familioj en la vilaĝo jam vespermanĝis, kaj de tempo al tempo aŭdiĝis infanaj krioj, ridoj kaj eksplodoj de petardoj. Mi ekmemoris okazajn antaŭ multaj jaroj. Estis en 1943, la plej terura periodo de la rezist-milito. La tuta distrikto falis en la manojn de la malamikoj, kaj ni povis agadi nur en la nokto. Estis ankaŭ la nokto de la dudek tria tago de la dek dua monato. Ni, aro da 'nokto-vagantoj', pasis silente tra la strato de iu vilaĝo okupita de la malamikoj. Trans la strato etendiĝis ŝnuroj kun interspacoj po dekoj da futoj. De ĉiu ŝnuro pendis kelkaj ruĝaj lanternoj kun sloganoj: "La feliĉa tero sub la imperiestra regado," "La kuna prospero de Orienta Azio," k.t.p. Estis korkrevige!

Mi volis eliri por vidi la nunan staton en la vilaĝo.

ADIAŬ

Karaj legantoj:

Dank' al la subtenado de diverslandaj legantoj, nia bulteno, post sia naskiĝo en 1950, sukcese plenumis sian taskon en informado al alilandanoj pri la ĉina popolo kaj en plifortigo de la solidareco inter la pacamaj popoloj de diversaj landoj. En la pasintaj pli ol tri jaroj publikigis por la diverslandaj popoloj pli kaj pli multe da eldonaĵoj pri nova Ĉinio. La gazeto *Popola Ĉinio*, kiu jam delonge aperadas en angla kaj rusa lingvoj, aperas ĉijare ankaŭ en japana lingvo, kaj de la bildgazeto *Ĉinio* jam eldoniĝis unu post alia angla-lingva, rusingva kaj Indonezia-lingva eldonoj. Ankaŭ la angla-lingva gazeto *China Reconstructs* bone informas al eksterlandaj legantoj pri la vivo de la ĉina popolo. Krome la Fremdlingva Eldonejo ankaŭ eldonis multajn tradukaĵojn de ĉinaj verkoj en angla, rusa, franca, germana kaj Indonezia lingvoj. Ĉio ĉi tio ebligas al la diverslandaj legantoj rekte kaj pli bone kompreni Ĉinion.

El leteroj de diverslandaj legantoj kaj el lastatempe ricevitaĵ eksterlandaj eldonaĵoj ni informiĝis, ke ankaŭ pli kaj pli multiĝis artikoloj pri nova Ĉinio en diverslandaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Multaj eksterlandaj verkistoj, kiuj vizitis Ĉinion, publikigis siajn verkojn pri nova Ĉinio. El Suda Ameriko ni ricevis hispanlingvan gazeton kiu sin dediĉas ekskluzive al informado pri Ĉinio.

Sekve de tiuj kondiĉoj, memkompreneble, pli kaj pli malmultiĝis la legantoj de *El Popola Ĉinio* en la regionoj kie oni jam povas havigi al si komprenon pri nova Ĉinio pere de eldonaĵoj en sia propra nacilingvo. Tio montras al ni, ke nia laboro jam povas esti alimaniere kaj pli bone plenumata per rimedo pli taŭga. Tial nia redakcio decidis ĉesigi la eldonadon de *El Popola Ĉinio*, kaj tiu ĉi estas ĝia lasta numero. Ĉi tie ni esprimas nian koran dankon al niaj karaj legantoj kiuj senĉese nin subtenadis kaj kuraĝigis dum la pasintaj pli ol tri jaroj.

Redakcio de *El Popola Ĉinio*

strato. Kiam mi transpaŝis la sojlon de la ĉambro mi ekvidis, ke Onjo Ĝoŭ staras en la korto en mallumo, kun la manoj kunplektitaj kaj murmuris:

"Se efektive ekzistas vi kuireja dio, ĉi-foje ne plu malsupren venu post via iro al la ĉielo. Via malsuprenveno estus tute senutila. Neniu kredas je vi, eĉ vian ikonon neniu vendas. En la nuna tempo ĉio estas super via potenco..."

En tiu momento la pordo de la orienta ĉambro ekmalfermiĝis kaj Ĝenjo elsaltis kvazaŭ simio kaj ridis akraŭoĉe:

"Hahahaha...avinjo, vi krevigos al mi la ventron!"

"Hahahaha..." ankaŭ Ĉuej-lan en la ĉambro ridis tiel, ke ŝi ekveis.

Onjo Ĝoŭ nek koleriĝis nek ridis, ŝi iris malrapide en la orientan ĉambron. Ĝenjo venis al mi, faris grimacon kaj ankaŭ eniris. Ambaŭ ŝi kaj ĉia patrino ridis interrompe dum longa momento.

Iom poste aŭdiĝis la mallaŭta voĉo de Onjo Ĝoŭ:

"Ĉu estas bone ke vi ne plu ridu? Aŭdante, Laŭ Ĉin ridos je ni."

Sed la knabineto ankoraŭ ne ĉesis ridi.

Mi staris ĉe la pordo de la ĉambro, levis mian kapon kaj rigardis la ĉielon. La steloj sur la ĉielo estis tiel densaj kaj brilaj. Mi sentis ion ŝvebe leviĝanta al la ĉielo—ne la kuirejan dion, sed la dolĉan arĝentan ridon de Ĝenjo. Ĉi diros al la steloj, ke la homoj okazigis per sia propra forto multe da neniam viditaj ŝanĝoj en la mondo...

Tradukita el "Vilaĝaj Skizoj" publikigita en n-ro 5, 1953 de ĉinlingva monata gazeto "Popola Literaturo."

1. Antaŭ lunkalendara jarfino oni trabalais la tutan domon.
2. Laŭ la moro de tiu ĉi loko, oni oferis sukerbulojn al la kuireja dio, la 23an de la 12a monato. Ili estas faritaj el malsukero en la formo de meloneto, kaj tre glueca. Oni volis ke la sukerbulo kungluu la lipojn de la kuireja dio ke li ne povu paroli malfavore pri la homoj kiam li estos en la Ĉielo. La ikono kiun oni vendis, estis plurkolora lignogravuraĵo.
3. kotoi: surgenue riverenci klinante la kapon ĝistere.

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio
Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 12

E N H A V O

Kreskanta Intereso en Komercio kun Ĉinio
Literaturaj Atingoj de Nova Ĉinio
Por Speguli la Grandiozecon de Granda Epoko
Nova Pekino en Konstruado
Por Ĉinia-Sovetia Amikeco
Vivo Komenciĝas je la Aĝo de 62
Rizo Aromas en Ĉanggoŭ-vilaĝo
La Oferto al la Kuireja Dio



Novjara Gratulo al Armeanaj Familianoj

**Post negad' en montvilago
Ĉio brilas en nov-vesto.
Ni glorigu la hejmanojn
Armeanajn je l' jar-festo.**

Pentrita
de
Ljoŭ Zi-gjoŭ